

Zagreba Esperantisto

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

ԹՈՒՔԱՆՅԱԻԻ
ՅԵՐՈՅԵՆԻՔՄԱՅԸՄՈՅ

Ĉi-numere legu pri:
ĈU KROATIO REVENAS AL EŬROPO?
INTERLINGVISTIKO ĈE FILOZOFIA
FAKULTATO EN ZAGREBO
ADRIATIKA FERIADO EN PRVIĆ LUKA
ESPERIGA STRATEGIO EN ALBANIO
LASTA SALUTO AL IVO BOROVEĈKI

3

2013

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana
Habulin, Marija Jerković, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Josip Pleadin

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Jarabono (6 numeroj):

120,00 kunaoj / 18,00 eŭroj

Pagebla al konto de Dokumenta Esperanto-Centro:

HR5023600001102158381

aŭ al UEA-konto:

deoc-f

RESUMO

Kiel vi certe scias, karaj legantoj, ekde la 1-a de julio Kroatio estas lando de Eŭropa Unio. Jam en la unua numero de nia gazeto en 2007, do antaŭ pli ol ses jaroj, ni elstarigis aliĝon al Eŭropa Unio kiel strategian celon de nia lando. Kaj nun, preskaŭ meteore rapide, tiu celo realiĝis, kaj kun si ekprenis lavangon da demandoj. Pro tio la artikolo "Ĉu Kroatio revenas al Eŭropo?" venas ĝustamomente. Kvankam ankaŭ en niaj antaŭaj numeroj, la redakcia politiko ĉiam celis diskonigi informojn pri nia lando, ne malutilas prezenti ian resumon de kroataj kontribuoj al la komuna eŭropa kaj monda heredaĵo. Eble la ĉi-numera ĉefartikolo helpas al vi kompreni kial Kroatio ĉiam konsideris sin mezeŭropa lando, kaj kroatoj eŭropanoj.

Eventoplena estis la nun finiĝanta somero. Ni faru ian resumon de nia somera laboro. Kongresoj kiel tradiciaj esperantistaj aranĝoj, en ĉi tiu numero de nia gazeto havas elstaran lokon. Ni informas vin pri la jubilea itala kongreso okazinta en Kastelaro, pri la pola kongreso okazinta en Lodzo kaj pri la kongreso de serbiaj esperantistoj okazinta en Niš. Bedaŭrinde, post du tre kvalitatigaj kongresoj, Kroatio ne okazigis sian nacian kunvenon. Tian evoluon de eventoj oni povis antaŭvidi, kaj do la neokazigo neniun surprizis. Sed, malgraŭ tio, kelkaj aliaj eventoj en Kroatio altiras nian atenton. Antaŭ ĉio, pro sia eduka graveco, la seminario de profesoro Velimir Piškorec en la Filozofia fakultato de Zagrebo. Pro sia internacieco kaj sukcesa realiĝo, sed ne malpli ankaŭ pro la konsiderinda reeŝo en la mediatoj, verŝajne la plej grava, kvankam liliputa, estis "Adriatika feriado" okazinta en Prvić Luka, al kiu ni dediĉas plejparton de ĉi tiu numero. El aliaj okazintaĵoj, ni raportas pri la jam tradicia Boatado sur la rivero Kupa.

El interesaj internaciaj eventoj ni amplekse informas pri la OSIEK-konferenco en Francio, Alp-Adria konferenco en Slovenio, kaj pri la klopodoj restarigi la movadon en Albanio.

Inter malmultaj kulturaj kaj historiaj temoj ĉi-numere, eble la plej interesa estas la preparado de ekspozicio de korea esperantisto-pentristo Ho Song en Kroatio. Intensiĝis ankaŭ la eldona agado, aparte dank' al UZE.

Kun granda doloro ni adiaŭas niajn samideanojn Ivo Borovečki, Josip Vrančić kaj Aleksije Herić, kiuj forlasis nin post multjara aktivado por Esperanto.

La venanta aŭtuno alportas novajn aranĝojn. Ne maltrafu Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj en Hraščina, la programon "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo", "Montkabanen Renkontiĝo" en Jankovac kaj aliajn.

ĈU KROATIO REVENAS AL EŬROPO?

Monato junio ĉiam prezentis iaspecan turnopunkton aŭ mejloŝtonon en la kroata historio. Multfoje, pro gravaj eventoj, junio estis kerno de kroatia ŝtateco. Ekzemple, **papo Johano la 8-a** en junio 879 aprobis per sia letero la ŝtaton de duko **Branimir**. En junio 1991 la kroatia Parlamento (*Sabor*) proklamis la sendependigon de Kroatio kaj ĝian retiriĝon el la eksa Jugoslavio kun trimonata prokrasto, kaj, finfine, la lasta tago de la ĉi-jara junio prezentis samtempe la lastan tagon de Kroatio ekster Eŭropa Unio. Ni ne analizu avantaĝojn kaj malavantaĝojn de Kroatio en la komuna unuiĝo de la plej granda parto de eŭropaj ŝtatoj. Tion ni lasu al estonteco. Sed ni analizu la eŭropajn trajtojn de Kroatio.

Antaŭ ol prezenti la multnombrajn kroatajn kontribuojn al eŭropaj scienco, arto, kulturo aŭ literaturo, nepras komenti kelkajn evidentajn obstaklojn kaj insinuojn kontraŭ Kroatio. Kroation dum jardekoj oni puŝadis en la balkanan regionon. Tiamaniere Kroation, la juvelon de katolikismo kaj eŭropismo, oni volis forpuŝi el Eŭropo.

Multfoje antaŭ ol Kroatio aliĝis al Eŭropa Unio, aŭdeblis de diversaj en- kaj eksterlandaj politikistoj kaj ĵurnalistoj, preskaŭ ekscitiga slogano: "Kroatio revenas al Eŭropo!" Ridindaĵo! Stariĝas tuj la kontraŭa demando: Kiam Kroatio ja foriris el Eŭropo?

Se iu ŝtato diversforme ekzistas ekde la jaro 879, ĝi ja evidente estas unu el la plej malnovaj eŭropaj ŝtatoj, ĉar pli frue estis fonditaj nur San Marino (en 301), Francio (en 486) kaj Ruslando (en 862).

La aserto pri eŭropa identeco de Kroatio estas

 *Radenko Milošević*

 *Hrvoje Šercar*



senprobleme pruvebla, se oni nur mallonge priskribas atingojn kaj meritojn de kroatoj, kies inventoj, artaj kaj literaturaj verkoj, estas enkonstruitaj en la eŭropajn artan kaj sciencan murojn, malgraŭ pluraj provoj de ŝtelado. La listo de kroataj kontribuadoj estas ne nur konsiderinda, sed nekredible longa. Ekzemple: kravato, zepelino, enciklopedio, torpedo, fontoplumo "penkalo", termosoj, dinamo, gioskopa kompasoj, lavpulvoro, termoforo, volframampolo, daktileskopio kaj ankoraŭ multaj aliaj inventaĵoj, devenas de kroataj genioj kaj inventistoj.

Se oni aldonus al tiuj inventaĵoj nur la neeviteblajn bazojn de la moderna vivo, kiaj ekzemple estas la alterna kurento, la trifaza sistemo por transmisio de elektra forto, generatoro kaj transformatoro por altfrekvencaj kurentoj, oni ankoraŭ ne elĉerpus la kroatan kontribuon al Eŭropo kaj eĉ al la mondo. Multaj kroataj inventaĵoj kaj ideoj estis pruvitaj

apenaŭ eksterlande, kaj pluraj estis atribuitaj al alilandaj inventistoj.

Imagu, kio okazus se tiuj inventaĵoj ne estus nuntempe konataj. Sen **Josip Ruđer Bošković**, **Nikola Tesla**, **Franjo Hanaman**, **Ivan Vučićić**, **Marcel Kiepaĉ**, **Ivan Blaž Vukić**, **Andro Mohorovičić**, **David Schwarz**, **Slavoljub Ernest Penkala**, **Marin Getaldić**, **Lavoslav Ružička** kaj **Vladimir Prelog**, la nuntempa ĉiutaga vivo estas apenaŭ imagebla.

Al la supra nomlisto ni aldonu kelkajn nomojn el la literatura kaj arta rondoj: **Ivan Meštrović**, **Julije Klović**, **Matija Vlačić**, **Markanton de Dominis**, **Faust Vrančić**, **Franjo Petrić** (lat. **Franciscus Patricius**), **Benedikt Kotruljević**, **Pavao Skalić**, **Marko Marulić**, **Ivan Ĉesmički** (lat. **Ian Pannonius**) kaj aliaj.

Aldone al listo de personoj, oni aldonu liston de gravaj monumentoj atestantaj pri alfabeteco, scienco kaj literaturo. Ili

estas skribitaj en tri diversaj kroataj skriboj: la glagolica (11-a jarcento), la cirila (12-a jarcento) kaj la latina (14-a jarcento). Historiaj dokumentoj atestas ke la glagolica skribo ekzistis en kroataj regionoj ekde la 10-a jarcento.

La tabulo de Baška estas unu el la plej gravaj monumentoj skribita per glagolico. Ĝi estas trovita en la preĝejo de Sankta Lucija apud Baška sur la insulo Krk. La tabulo de Baška atestas, ke tiutempe en la kroataj regionoj ekzistis nacia literaturo verkita en nacia skribo, pli frue ol ĉe multaj aliaj eŭropaj popoloj. La tabulo atestas pri la vivanta kroata lingvo kaj konfirmas la suverenecon de la kroata reĝo **Zvonimir**. Pri la Tabulo de Baška kaj glagolico bonvolu legi en "Zagreba Esperantisto" n-ro 2 (6)/2008, paĝo 55.

La Statuto de Poljica estas la plej grava informfonto pri soci-ekonomiaj rilatoj kaj rajtoj de la Respubliko de Poljica, kiu estis sendependa ekde la 13-a jarcento ĝis la invado de **Napoleono**, per kio la ses jarcentojn ekzistinta Respubliko de Poljica ĉesis ekzisti. La Statuto estis skribita per la kroata originala cirila skribo kiel miksaĵo de ĉakava kaj ŝtokava dialektoj. Ĝi normigas la bazajn interesojn de ĉiuj civitanaj tavoloj, kaj inkluzivas diversajn decidojn kaj verdiktojn

La Leĝaro de Vinodol el la jaro 1288 estas la plej malnova tiaspeca jura teksto en la kroata lingvo, sed ankaŭ la plej malnova en suda Eŭropo. Ĝi estis transskribita per kursivaj glagolicaj literoj en la 16-a jarcento, kaj ĝi celas kodigi la elementojn de juraj kutimoj de la regiono de Vinodol. Aparta valoro de la Leĝaro estis neakceptebla (en la juĝa procedo) de rezultoj akiritaj per torturado, kio estis nekonata en la tiamaj punleĝoj en Eŭropo. Specialeco de la Leĝaro estis ankaŭ morala protekto de virinoj, kaj por la unua fojo estis preskribita puno pro seksperforto. Estis preskribite




ankaŭ, ke la juĝantaro en tiaj kazoj povas konsisti nur el virinoj!

Kompare kun pli grandaj eŭropaj popoloj ol estis la kroata, la kontribuoj de kroatoj en ĉiuj menciitaj kampoj estis multe pli granda ol oni atendus.

Ni, ekzemple, menciuj la kontribuojn de sciencistoj.

Pri unu el la plej grandaj, **Nikola Tesla**, ni skribis detale en la numero 2 (22)/2013, paĝoj 38-39 de "Zagreba Esperantisto". Por ne ripeti la faktojn, ni nur menciuj, ke li lasis al la mondo pli ol 700 inventojn el elektrotekniko, radiotekniko kaj aliaj komplementaj fakoj.



Nemultaj konas la nomon de la nobelo **Marcel Kiepack**, mirinda infano, kiu faris multajn inventojn en la kampoj de elektroniko, transformatoroj, magnetismo, akustiko kaj elsendo de sonsignaloj. Kaj ĉion ĉi li sukcesis fari ĝis la dekaŭa vivojaro. Jam kiel deksejarulo **Kiepack** patentigis ŝipkomponon kiu ĉiam montras la nordan direkton, sen problemoj rilate al fero aŭ magneta forto. Li patentigis dinamon por diversaj veturiloj, respektive elektran generatoron kiu uzas la forton de veturilo mem. Lia korespondado kun elstaraj mondaj sciencistoj kaj inventistoj estis abunda kaj la plej elstaraj eŭropaj universitatoj invitatadis lin por prelegi. Kiam komenciĝis la Unua mondmilito, **Kiepack** anonciĝis kiel volontulo kaj en sia 21-a jaro pereis ĉe la rusa fronto.

Franjo Hanamann, la fama kroata kemiisto kaj metalurgo inventis la unuan en la mondo ampolon kun metala-volframa fadeno. Ankoraŭ nuntempe tiu elektra lumigilo estas la plej bona solvo, malgraŭ malŝparo de energio, kiun ĝi elradias kiel varmigilo. La invento de **Hanamann** pli poste estis aplikita ĉe plibonigo de diodoj kaj triodoj, necesaj en radiotekniko.

Ivan Vuĉetiĉ (pri kiu ni skribis en "Zagreba Esperantisto" n-ro 3 (7)/2008, paĝo 79) naskiĝis sur la insulo Hvar, sed kiel multaj aliaj eŭropanoj, pro ekonomiaj aŭ politikaj kialoj, li elmigris al Argentinon, kie li laboris en la statistika policoficejo en Buenos Aires. Li inventis la metodon de indetifikado per haŭtlinioj sur la polma flanko de fingropintoj, la t.n. "daktiloskopion".

Tamen, en la unuan lokon oni nepre metu **Josip Ruĉer Boškoviĉ**, kiun grandaj fizikistoj kaj matematikistoj nomis "scienca ŝtonego". Mallonge menciendas, ke lia grandioza verko "Theoria philosophiae naturalis redacta ad

unicam legem virium in natura existentium“ (*Teorio de natura filozofio*) donis fundamenton por la t.n. "teorio de atomoj" kaj al ĝi sin apogas la mondfama "atom-modelo" de la Nobelpremiito **Niels Bohr**. En la verko **Bošković** esprimas sian starpunkton, ke ĉio estas "materio kaj moviĝo". Laŭ li, la materio konsistas el identaj faktoroj, sed malsamaj leĝoj diversigas ĝin. La teorio de **Bošković** havas sian fundamenton en la ideo pri "seninterrompaj ŝanĝiĝoj". Tiel la demando pri hazarda kunpuŝiĝo de fortoj en la naturo malfermis bazon por la ekscio de **Bošković** por percepti la strukturon de materio kaj funkciadon de la universo. **Bošković** enkondukis la leĝon de fortoj, kiuj estas rifuzitaj ĉe malgrandaj elektronikaj distancoj, kaj atrakciaj ĉe grandaj distancoj. Ŝanĝiĝo de atrakcia forto al rifuza kaj inverse estas nomita la *kurbo de Bošković*. La kampo de **Bošković** priskribas lian starpunkton ke atomo estas la centra punkto ĉirkaŭ kiu disvastiĝas nuboj de atrakci-rifuzaj fortoj.

Mark Antun de Dominis estis kroata matematikisto, fizikisto, filozofo kaj ĉefepiskopo de Split. Dum sia vivo li suferis grandegan maljuston kaj mortis en malliberejo. Liaj verkoj kaj kadavro estis ĵetitaj en la riveron Tiberio. En kadro de fiziko li esploris dispersion de

blanka lumo. Laŭ li, la blanka lumo konsistas el kontinua sinsekvo de ĉiuj koloroj de la videbla spektro, ekde la ruĝa ĝis la viola. Liaj esploroj interalie rezultis per interpreto de la fenomeno de ĉielarko. La granda fizikisto **Isaac Newton** komence de la 18-a jarcento atestis, ke la esplorado de **Dominis** pri ĉielarko kaj liaj interpretoj de du dispersoj kaj refraktoj, kaj de reflektado de lumo sur pluvgutoj, estis grandega malkovro. Pri **Dominis** ni skribis pli detale en "Zagreba Esperantisto" n-ro 1 (12)/2010, paĝoj 28-29.

Faust Vrančić el Ŝibenik estis diversfaka verkisto, leksikografo, sciencisto, inventisto, inĝeniero ktp. Lia verkaro konsistas el inventoj, konstruaĵoj kaj leksikografiaj kaj filozofiaj tekstoj, pro kio li estis vera reprezentanto de renesanco. En lia verko, la famega libro "Machinae novae" (*Novaj maŝinoj*) evidentiĝas la tuta vasto de liaj scioj kaj interesoj. Ĝi enhavas 49 skizojn kaj projektojn kun prezento de teknikaj inventoj, projektoj kaj konstruoj - pontoj, uzado de akvofluoj kiel movoforto, kaj la fama "homo volans". Vrančić konstruis muelejon kiun funkciigas la tajdo. Li konstruis ankaŭ telferon, konstruon de metalaj pontoj (pendantaj sur feraj ĉenoj, t.e. pendantaĵoj), kiaj estis konstruitaj nur du jarcentojn poste.

La skizo de lia bone

konata parasutisto "homo volans", aperinta en "Novaj maŝinoj", tro ofte en la literaturo estas atribuita al Leonardo da Vinci, kies teoriojn Vrančić praktike pruvis.


Krom mencii liajn mekanikajn konstruojn, oni ne forgesu ke per sia leksikografia laboro li markis sian epokon, aldonante al sia universaleco la unuan memstaran, prese eldonitan kvinlingvan vortaron "*Dictionarium quinque nobilissimarum Europae linguarum*". En ĝi troviĝas la lingvoj kiujn li mem konis, kaj la lingvoj de komunikado kaj verkado en la regiono de tiama Kroatio. Per tiu ĉi verko la kroata leksikografio okupis gravan lokon en Eŭropo.

Alia elstara sciencisto el Kroatio estis **Andrija Mohorovičić** kiu science orientiĝis al problemoj de sismologio kaj meteologio. Lia ĉefa scienca laboro estis analizo de tertremaj ondoj el kio sekvis la malkovro de diskontinueco de Mohorovičić. Pri tio temo ni skribis en aparta artikolo en "Zagreba Esperantisto" n-ro 6(19)/2011, paĝoj 179-180.

Zagrebo donis al la mondo novajn ideojn kaj mondfamajn produktojn, pri kiuj eĉ bone informitaj homoj ne scias, ke ili devenas el la kroata metropolo.

Zagrebano **Slavoljub Eduard Penkala** estas la unua moderna kroata inventisto, kiu malgraŭ multaj aliaj inventaĵoj, restis fama pro la mekanika krajono kaj fontoplumo (inventita en la jaro 1906), kiu laŭ li eĉ ricevis la nomon "penkalo". Krom tio, en la jaro 1909 li konstruis la unuan duseĝan aerveturilon. Pli detala artikolo pri Penkala aperis en "Zagreba Esperantisto" n-ro 2/2007, paĝo 51.

Se oni mencias la vorton "zepelino", malofte scias ke tian flugmaŝinon projektis Zagrebano **David Schwartz**, konstruisto de aerveturiloj, kies destino similas al multaj niaj samlandanoj. ▶



Paĝoj el la vortaro de Faust Vrančić
(fotitaj en la Memorkolekto de Vrančić en Prvić Luka)

LA PENTRAĴOJ DE HO SONG JAM EN KROATIO

 *Josip Pleadin*



Kiel anoncite en “Zagreba Esperantisto” n-ro 20 (decembro 2012), mi planis venigi al Kroatio la korean pentriston-esperantiston **Ho Song**. Nun tiu plano fariĝis realaĵo! La pentraĵoj de Ho Song ekde la 12-an de aŭgusto 2013 jam troviĝas en Kroatio, pretaj por esti ekspoziciataj. Ili faris longan vojaĝon de 4000 kilometroj, el Rumanio kie ili estis ekspoziciitaj antaŭe, al la ĉi-jaraj OSIEK-konferenco en Francio kaj la itala kongreso de Esperanto.

La ekspozicio konsistanta

el 25 verkoj, plejparte olepentaĵoj sur tolo, laŭplane restos en Kroatio unu jaron, ĝis aŭgusto aŭ septembro 2014. Dum tiu tempo Dokumenta Esperanto-Centro organizos plurajn ekspoziciojn. Detala listo pri urboj kaj galerioj kiujn vizitos la ekspozicio ankoraŭ ne estas komplete. La unuan fojon la pentraĵoj estos ekspoziciataj en Bjelovar en septembro 2013. Certan intereson pri la ekspozicio montris Sisak (jarfine de 2013) kaj Križevci (tre verŝajne en majo 2014).

Kiel planite, la aŭtoro devus reveni al Eŭropo somere de 2014, kiam li povus persone ĉeesti

iun el tiam organizotaj ekspozicioj.

Per ĉi tiu artikolo mi invitas interesigantajn Esperanto-societojn kaj Esperanto-aktivulojn esplori la eblecon organizi la ekspozicion ankaŭ en siaj urboj. Bonvolu informiĝi ĉe DEC ĉu en planata periodo la ekspozicio estas disponebla. Krom trovi galerion kiu volas organizi la ekspozicion, la organizantoj devas kovri ankaŭ parton de ĝeneralaj kostoj (transporto, invitiloj, afiŝoj, katalogoj ktp.).

Pri ĉiuj detaloj bonvolu informiĝi ĉe

dec.kroatio@gmail.com

► Nehavinte monon, lia edzino post lia morto vendis la patenton al la grafo **Zepelin**.

Marin Getaldić, la lernanto de **Galileo**, estas unu el la elstaraj kroataj matematikistoj kaj fizikistoj. Li malkovris refrakcian teleskopon kaj konusajn lensojn. Li estis pioniro de algebra geometrio.

Ivan Blaž Lupis estis inventinto de torpedo kaj unu el la fondintoj de la unua torpedo-fabriko en Rijeka en la jaro 1866.

Nia spaco ne permesas mencii pli, ol nur koncize la du Nobelpremiitojn: **Lavoslav Ružička**, kiu ricevis la Nobelpremion por kemio en 1939, kaj la scienciston **Vladimir Prelog**, havanto de ok doktoraj titoloj, kiu ricevis la Nobelpremion por kemio en 1975. Prelog dum 50 jaroj laboris en Zuriko, publikiginte preskaŭ 600 sciencajn laboraĵojn. Li progresigis la kroatian farmaceŭtan industrion, kaj fondis la Zagreban lernejon

por organika kemio, kiun li levis al eŭropa nivelo.

Konante ĉiujn ĉi faktojn, kaj forte aprezante la preskribon el la Konstitucio de Kroatio, ke "Respubliko Kroatio alianciĝas kun aliaj ŝtatoj, retenante la suverenan rajton ke ĝi mem decidu pri cedu de siaj rajtoj al ili, kaj pri la rajto ke Respubliko Kroatio propravole eliru el tiaj aliancoj", ni esperu ke Eŭropa Unio bonvenigos Kroation, kiu kresku kaj floru en ĝia sino.



"Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto" en Filozofia fakultato de Zagrebo

✍ *Mihaela Cik*



Profesoro Velimir Piškorec

Unu el la plej postulemaj misioj de ĉiu entuziasmulo pri Esperanto estas disvastigo de Zamenhofaj ideoj por pli justa

mondo efektivigota laŭ postuloj de tutmonda egalrajteco kaj interkompreno. Tiun mision prete kaj lerte plenumas d-ro. sci. **Velimir Piškorec**, profesoro en la Germana fakto ĉe Filozofia fakultato en Zagrebo, kio ankaŭ ĉi-jare en la somera semestro gvidis kolegion "Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto".

La seminario estis elektebla por ĉiuj gestudentoj, sed ĝin plejparte partoprenis estontaj lingvistoj kaj filologoj. Tial ne miras ke la ĉefaj kialoj por elekto de tiu ĉi seminario estis la intereso pri lingvoj kaj ankaŭ pri Esperanto mem.

En la interlingvistika parto de la seminario, la gestudentoj prezentis kaj diskutis artikolojn de famaj fakuloj pri la historio de planlingvoj, kreado de Esperanto kaj ĝia iniciatinto d-ro Zamenhof. Krome, profesoro Piškorec kaj la

seminarianoj komparis Esperanton kun aliaj planlingvoj kiel Volapuko, kaj akcentis ĝiajn avantaĝojn.

Tiamaniere la gestudentoj povis plej bone kompreni la sukceson de Esperanto en la internacia komunikado. Post la enkonduka interlingvistika parto de ĉiu prelego, sekvis lernado de Esperanto laŭ la "Zagreba metodo". La gestudentoj estis impresitaj per la facila gramatiko kaj vortfarado kaj, ĉar ili plejparte studas fremdajn lingvojn, ili tre bone povis detekti la lingvan materialon elprenitan el aliaj lingvoj. Siajn novajn kaj valorajn eksciojn la partoprenintoj de la seminario atestis per skriba ekzameno pri baza kono de la Esperanta gramatiko kaj vortaro. Generalaj impresoj pri la seminario estis bonegaj: la gestudentoj volonte plenumis siajn taskojn, diskutis pri ampleksaj lingvaj problemoj kaj poste rakontis pri Esperanto kaj eĉ rekomendis la seminarion al siaj konatoj.

Unu el la plej interesaj partoj de la seminario por mi mem estis la diskuto pri Esperanto kiel vivanta lingvo, kiu havas siajn parolantojn, originale verkitajn librojn kaj kantojn, komunan tradicion. Unuvorte: sian kulturon. Profesoro Piškorec sukcesis tra anektdoj forigi dubojn pri Esperanta vigleco kaj aktualeco, kiuj aperis en la unuaj prelegoj. Li interesigis la gestudentoj por vasta kampo de interlingvistiko kaj ĝiaj rilatoj kun sociologio, filozofio aŭ filologio. Verŝajne inter la ĉi-jaraj partoprenintoj de la seminario kaŝiĝas almenaŭ unu nova entuziasmulo, kiu daŭre diskonigos Esperanton.



Filozofia fakultato de Zagrebo

JUBILEA ITALA KONGRESO

 *Maria Butan*

Pentrinda itala vilaĝo Kastelaro, alte situanta sur monteto kaj ĉirkaŭata de olivarbejoj, gastigis la 80-an Italan Kongreson de Esperanto, inter la 3-a kaj la 10-a de aŭgusto 2013. Sed, certe, ne la krutaj deklivoj, kiujn ni devis alfronti por atingi tiun lokon, nek la dufoje tage malsupren- aŭ suprenirado al kaj de la kongresejo allogis tiom da partoprenantoj (ĉirkaŭ 240 el 34 landoj). Parto el ni venis pro la proksimeco de la Liguria Maro, kun la fama San Remo, aliaj revenis aprecante la kvalitojn de la italaj kongresoj, kaj la jubilea certe ne seniluziigis nin.

Por tiuj kiuj ne partoprenas la UK-on de iu jaro, aliĝi al la itala kongreso estas alternativo neneglektenda, ne nur tial ĉar ĝi prunteprenis la strukturon de la UK-oj, daŭras unu semajnon, ofertas plurnivelajn lingvajn kursojn, seminariojn koresponde al la ĉefa temo, prelegojn, riĉan libroservon, spektaklojn, multnombrajn ekskursojn. La kongreso estas vere internacia, kelkfoje kun pli da eksterlandanoj ol da italaj partoprenantoj mem, ĉar allogas ankaŭ la rabatita aliĝkoto.

UEA aparte honorigas tiujn kongresojn, sed, se en 2011 estis la prezidanto Probal Dasgupta kiu inaŭguris tiun de Torino, se en 2012 la ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak parolis dum la solena malfermo en Mazara del Vallo, nun alia tre konata estrarano de UEA, Humphrey Tonkin, ne nur prezentis la festparoladon "Esperanto, ponto

por la eŭropa kulturo", sed ankaŭ, kiel eminenta spertulo pri Ŝekspiro, riĉigis la kulturalan programon per du interesaj, altnivelaj prelegoj: "William Shakespeare - moralisto" kaj "La homo Shakespeare kaj la varo Shakespeare".

Aliaj prelegantoj enkadrigis siajn kontribuojn en la ĉefan temon de la kongreso kiu estis SIN KOMPRESI POR SIN RESPEKTI. Se post trihora lingva kurso, aŭ ege incitaj diskutoj en la seminarioj, oni kapablis ankoraŭ intelekte elteni - malgraŭ la alterna varmeĝo aŭ malvarmo, ĉar la klimatizilo funkciis nur enŝaltita kaj malŝaltita mane - oni povis tagmeze ekscii pri "Multlingveco kaj multkultureco en la rumanaj regionoj" (Maria Butan) aŭ pri "Esperanto kompare al naciaj lingvoj" (João Silva dos Santos) aŭ "Kio mi estus sen Esperanto?" (Eddy Sava Babiu). Sed tute speciala prelego estis tiu de la korea esperantisto HO Song, kiu proponis al la aŭskultantaro interesan resuman prezentadon de la orient-azia arto, akompanata de bildoj. Fakte, ankaŭ lia propra ekspozicio de 26 pentraĵoj, kiun li ĝuste inaŭguris, la unuan tagon de la kongreso, estis bildigo de tiu arto. Li ofertis plurajn detalojn al la kongresanoj kiuj admiris liajn pejzaĝojn, florojn aŭ homfigurojn, ĉar la ekspozicio estis vizitebla dum la tuta semajno en la ĉefa salono.

La kurson por komencantoj gvidis Mariana Genĉeva, tiun por progresantoj Mariana Berariu, kaj la perfektigan

kurson Rafael Mateo. Tiuj kiuj jam bone regas la lingvon, havis la elekton inter Seminario A, "Eŭropa kulturo tra Esperanto" gvidata de Paul Gubbins, kaj la Seminario B, "Historio, teorio kaj praktiko de tradukado" proponita de profesia tradukistino Maria Nuyanzina.

La tre laboremaj kongresanoj, celante plialtigon de sia sperto, vizitis la Seminarion pri lingvoinstruado, gvidata far la nelacigebla Katalin Kováts. Ni ne forgesu ke por multaj el ni, la semajno tute ne estis feriado, ĉar jaŭde okazis kaj ekzamenoj laŭ la Eŭropa Referenc-kadro, kaj ekzamenoj de la Itala Instituto de Esperanto.

Sed tiuj kiuj ne celis diplomojn, povis plene ĝui la posttagmezajn teatraĵojn "Ne lasu min sola" (farsa de Georgo Handzlik, en kiu rolis Sasa Pilipović kaj la aŭtoro mem), aŭ "Minhausen - la vera proceso" (puppeteatraĵo realigita de Christoph Frank).

Interesa debato okazis jaŭde kun incita titolo: "Ĉu eŭropa kulturo aŭ eŭropaj kulturoj". Nehazarde, la enkonduka parolado apartenis al Nicolo Cristaldi, urbestro de Mazara del Vallo, kiu gastigis la pasintjaran kongreson. La loĝantaro de lia urbo apartenas al pli ol 30 etnoj, kaj reprezentas interesan modelon de kunvivado kaj interkulturo. Laŭvice esprimis siajn opiniojn la podianoj Paul Gubbins, Maria Butan, Jean-Pierre Boulet kaj Manuel Rovere. Ĉi-okaze la Itala Federacio de Esperanto honorigis



per diplomo la urbestron Cristaldi, kies projektoj fondi mediteranean interkulturalan instituton surbaze de Esperanto, kaj organizi en la venontaj jaroj Kulturana Esperanta Festivalon en Mazara (Sicilio), estas tre gravaj por la itala esperantistaro kaj ne nur.

La plej kuraĝaj kaj rezistaj povis partopreni la noktan meditadon: "Esperantujo inter eŭropaj lingvaj kaj religiaj minoritatoj", gvidatan ekde la 23h00 de Davide Astori, aŭ ludi per sorobano, je la sama horo, asistataj de Kimie Markarian. La porjunulara programo havis ankaŭ noktomezajn erojn.

Parto de la aliĝintoj ĉefe ĝuis, se ne la maron, almenaŭ la buntan ekskursprogramon. Fakte, se oni partoprenus ĉiujn, oni estus vizitintaj la kongresejon nur por la inaŭgura kaj ferma solenaĵoj! La plej instrua, tuttaga ekskurso celis prezenti la muzeon kreitan en Bordighera far la unua esperantisto sur itala teritorio; tiu estis la brito Clarence Bicknell, kiu sin dediĉis al Esperanto ekde 1897, partoprenanto ankaŭ al la tute unua UK en 1905, pasia botanikisto, kiu malkovris en

la Maraj Alpoj (precipe en la Valo de Mirindaĵoj) ankaŭ surrokaĵajn gravuraĵojn el la bronza epoko. Ĉiuj liaj eltrovaĵoj, listigitaj kaj klasigitaj de li mem, estas daŭre science studataj kaj konsistigas nuntempe mirindan muzeon en la montara urbeto Tende, sur franca teritorio, kiun ni vizitis posttagmeze. La vojo gvidis nin ankaŭ al la sojlo de la "Sikstina Kapelo de la Alpoj", proklamita tiel dank' al altprezaĵ, mirindaj freskoj, realigitaj dum la 16-a jarcento en tiu "Notre Dame des Fontaines" en la arbaroj, super la urbeto La Brigue.

Aliaj proponitaj ekskursoj ebligis viziton al la granda urbo Ĝenovo, mezepoka memstara respubliko, aŭ al Montekarlo, la ĉefurbo de la princlando Monako, aŭ al San Remo, aŭ al la Valo Nervja. Mi partoprenis tiun kiu postulis de ni grimpadon ĝis la pinto de la urbo Cervo, ne nur por domini kaj admiri la maron de tie, sed ankaŭ por esti surprizita trovi la statuon de Jeanne d'Arc en Oratorio de Maria, aŭ ekscii la historion de riĉa preĝejo konstruita per mono, kiun la loĝantoj obtenis vendante kolektitan koralon funde de la maro. Imperia

impresis nin per historia centro, kies arkitekturo similas al tiu de Torino, sed ankaŭ per tre bone farita, riĉa de informoj sugeste prezentitaj, Muzeo de la olivo (kultivado, kolektado, evoluo de la procedoj por obteni la faman oleon, diversaj kvalitoj kaj virtoj).

Sed la ununura komuna programo de ĉiuj kongresanoj, ĉu seminarianoj, ĉu kursanoj ĉu ... ekskursantoj, estis certe la vesperaj koncertoj. Ili kunigis ne nur esperantistojn, sed ankaŭ la loĝantojn de la vilaĝo, ĉar la plejmulto el la koncertoj okazis sur la vilaĝa placo de Kastelaro. Laŭvice, ni ĝuis la muzikon de la dano Kim Henriksen, de la franco Guillaume Armide, de la italo Manuel Rovere, de la polo Georgo Handzlik, de Grazia Barboni kaj, laste, de Kapriol, grupo kiu ne nur ĉarmis, ensorĉis nin per nekutima muziko, sed ankaŭ verve dancigis nin. Ĉu ni estis tiom entuziasmaj por ne lasi eskapi la lastajn momentojn? Ĉu pro bedaŭro ke la kongreso devis finiĝi? Espero por 2014, nova riĉa programo de la 81-a kongreso, kiu okazos en Fai della Paganella (Trentino).

KONGRESO DE SERBIAJ ESPERANTISTOJ EN NIŠ

de Nebojša Stanković kaj

"Narodne novine" (Niš) de la 26-a de aŭgusto 2013

La 6-a kongreso de serbiaj esperantistoj okazis inter la 16-a kaj 18-a de aŭgusto en Niš, organizita de Fervojista Esperanto-societo "Mile Veličković". Partoprenis ĉirkaŭ 100 geesperantistoj el ĉiuj partoj de Serbio, kaj alilandanoj el Rusio, Bulgario, Nederlando, Makedonio, Grekio, Hungario kaj Respubliko Serba.

En la kultura programo kantis la Etno-grupo "Zone" el la Societo "Instruista liro". Infana eklezia folklorensemblo "Branko"

prezentis dancojn el la regiono de Niš, Violeta Ristić recitis kaj Radmila Blažić kantis en Esperanto. Folkloran programon prezentis Folkloro societo "Sveta Ivanović" el Hum kaj profesia aktoro Saša Pilipović el Kragujevac surscenigis la prezetnaĵo "Galileo". La kongreson persone salutis de la scenejo Tatjana Loskutova (Rusio), Kanjo Kanev, Angel Maglov, Meĉta Nikolova, Bojidar Leonov, Metodi Markov (Bulgario), Viktor Galeski (Makedonio), Johan

Derks (Nederlando), Rodica Todor (Rumanio), kaj pluraj personoj ankaŭ skribe.

En la labora parto funkciis Komisiono por enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj laborgrupo por Statuto de SEL. Prelegis Dimitrije Janičić, Johan Derks kaj Miodrag Stojanović. Estis organizita urborigardado, vizito al Niška Banja kaj Nishvill jazz festival.

Tuttaga ekskurso gvidis al Đavolja varoš kaj Prolom Banja.



FRANCA IEK DE



La Internacia Esperanto-Konferenco (IEK) de OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) okazas ĉiujare aliloke, kiel multaj aliaj Esperanto-aranĝoj, kaj la fakto ke oni voĉdonas du jarojn antaŭe por la temo kaj la loko, ofertas kaj la eblecon bone organizi ĝin, kaj la tempon mense kaj anime prepariĝi por partopreni en ĝi. Por mi tiu estis la 15-a partopreno, ĉar mi fidele ĉeestis ekde 1997, kvazaŭ mi estus aliĝinta por ĉiam. Allogis min la tre interesaj temoj - ĉu ege ligitaj al la lando gastiganta, ekz. "Heredaĵo de la antikva Grekio al la nuna Eŭropo" aŭ "Bizanca kulturo" kiam IEK okazis en Rafina (Grekio) en 1997 kaj 2005, aŭ "Influo de la latina lingvo kaj de la romia civilizo" (Trieste, Italio en 1998), "La ĉina saĝeco" (Wuhan, Ĉinio en 2011) - ĉu ĝenerale riĉigaj, ekz. "Mono kaj civilizo" (Metz, Francio en 1999), "Kio estas Oriento" (Timișoara, Rumanio en 2006), "Sciencfikcio kaj Robotoj" (Svitavy, Ĉeĥio en 2012). Allogis min ankaŭ la tre interesaj homoj, precipe la prelegantoj, sed ankaŭ la aliaj partoprenantoj, kies rimarkindaj diskutoj post prelegoj kompletigas kaj nuancigas la ĉeftemon. Preterpase mi diru, ke la matenajn prelegojn, du po tage, ne konkurencas ekskursoj aŭ aliaj programeroj, do ni ĉiuj povas plene profiti de la kultura programo. Kaj fine, allogas min ĉiam la elekto, inter pluraj verkoj de tiu al kiu, post sekreta voĉdonado, oni aljuĝos la premion de OSIEK. Origine, oni proponis rekompenci la plej bonan Esperantigon de nacia verko, fakto kiu okazis ekz. en 2007 en Pazarĝik (Bulgario), kiam oni premiis "Vojaĝon al noktofino" de Céline, tradukitan de Jak le Puil kaj Armela Le Quint, aŭ, lastjare en Ĉeĥio, "La Sentecon" de Imre Kertész, tradukitan de István Ertl, sed en la lastaj jaroj, oni "premiis vivantan esperantiston pro kultura kreaĵo en Esperanto..." (vidu la Jarlibron de UEA, paĝo 86), ne gravas ĉu libro aŭ kasedo.

Ĉi-jare, la IEK okazis en Francio, en Saint-Amand-Montrond, inter la 20-a kaj 26-a de julio, kaj la temo estis "Muziko kaj Esperanto". Oni scias ke Francio estas unu el la luliloj de la muziko en Esperanto, kaj ne hazarde, la organizanto estis Jak le Puil, fame konata franca kaj esperantista bardo. La plejparto de la prelegoj prezentis, memkompreneble, la francan kontribuon al la muziko en Esperanto, ĉu originale verkita, ĉu tradukita el famaj francaj tekstoj. Kaj eĉ se du prelegoj de Mikaelo Bronŝtejn elvokis la rusajn bardojn aŭ la nunajn realigojn de kompaktdiskoj "Oraj kantoj", eĉ se Ansofi Markov elvokis pionirojn komence kun Tanejev de la fino de la 19-a jarcento, la ĝenerala etoso, kiu kortuŝis min, estis influata de la rememoraĵoj de Michel Duc Goninaz, Jacques Le Puil, Serge Sire, Jean-Pierre Danvy kiuj kunlaboris kaj kunlaboras de 50 jaroj, ekde la ekzisto de famaj parizaj kabaredoj de Raymond Schwarz, ĉu per originalaj melodioj, ĉu tradukante multŝatatajn francajn kantojn. Do, pro tio mi konsideras, ke la IEK 2013 estis ĉefe franca. La posttagmezoj estis dediĉitaj al vizitoj. Unue ni admiris la fortikaĵon de Saint-Amand Montrond, kies tumulta historio impresis nin, tra la ĉiĉeronado de tre pasia esploristo. Dum la tempo de la Granda Conde, la

arnea fortreso kapablis kontraŭstari al la reĝo Ludoviko la 14-a, sed malaperis sub tunoj da tero, pro ties revenĝo. Nuna fondaĵo tre pacience (ekde 1974) elfosas kaj eltiras al la lumo belegajn turojn, defendmurojn, strategiajn galeriojn, antaŭ ol belega arbareto de tilioj komplete neniigu ilin. En alia tago ni admiris la freŝdate restaŭritan abatejon de Noirac, kies ejoj, imponaj kaj silentaj, parolas al bona aŭskultanto pri la tempoj de kulturaj nestoj dum tumulto de mezepokaj militoj. Tie, same, la majeston de muroj konkurencis aleo de multcentjaraj tilioj. Ankaŭ alia vizito, tiu de la arbaro de Tronçais, instruis nin pri la vegetalaj venkoj, pri la tenemo kaj altenigemo de la naturo. Veras ankaŭ ke la imponaj kverkoj estis helpataj de la homa sperto por rezisti dum jarcentoj kaj atingi halucinan altecon. Sed la vidindaĵo la plej fama, kiun la vizitprogramo proponis, estis certe la katedralo de Bourges, kies alteco kaj majesto estas nur homa atingajo. Mi ĉiam kliniĝas antaŭ laborego de homoj tiom dediĉitaj al idealo. La lasta vizito, tiu de romiaj restaĵoj de Drevan, lernigis nin pri antikvaj arkitekturo, civilizo, kulturo, ĉar tie ni vidis ĉion: kaj teatron, kaj banejojn kaj forumon, ateston de granda kunveno de amasoj venante por celebri diversajn diojn de tiu epoko.

Dum la vesperoj, la Festo-Salono de la urbeto resonis de konkreta muziko. Ĉu temis pri la voĉo de Mikaelo Bronŝtejn (dimanĉe) aŭ pri la bonhumura muziko de Jak le Puil (dum la adiaŭa ĵaŭdo), aŭ pri la multfomaj kaj diverssonaj klarnetoj de Serge Sire (merkredo), ni ĉiuj ŝatis aŭskulti ... Esperantan muzikon. Pli speciala vespero estis tiu dum kiu oni prezentis la filmon "Esperanto", realigitan de Dominique Gautier.

Vendrede, post la ĝenerala asembleo, dum kiu Anne Jausions transdonis la prezidantecon al Mantha Christou, ni voĉdonis por la OSIEK premio. La ĉi-jara venkinto estas Mikaelo Bronŝtejn, por la romano "Dek tagoj de kapitano Pustnikov", kontraŭ Sen Rodin, Josip Pleadin ("Ordeno de Verda Plumo), Cadei (traduko de la "Gefianĉoj" de Manzoni), kaj la lumdisko "Esperanto elektroniĉe".

Kiel kutime, la organizantoj proponis ankaŭ plurajn postkonferencajn ekskursojn, tuttagajn, kies partoprenantoj povis promeni laŭ spuroj de Georges Sand, admiri famajn ceramikaĵojn de la regiono kaj interesan vilaĝon. Mi ne partoprenis tiun programon, do mi ne detaligos ĝin. Certe, tiu parto pli rondigis la tutan eventon. Venontjare, la IEK okazos en Rumanio, en la urbo Braŝovo, situanta en la interna kurbigo de Karpatoj, urbo de tradicia kulturo, kun belegaj mezepokaj monumentoj kaj admirindaj montaraj ĉirkaŭaĵoj. Nur la decidita temo (pri kiu ni voĉdonis en 2012) estos nemontara. Temas pri "la Maro en literaturo kaj muziko". Organizaj detaloj aperos en alia numero.



ESPERANTA FERIADO EN KROATIO

 *Raita Pyhälä*

Kroata Dokumenta Esperanto-Centro organizis feriosemajnon en insulo Prvić (areo nur 2,37 kvadrataj kilometroj, sed la insula marbordo pli ol dek-kilometra). Proksime situas duoninsulo de Primošteno, kie esperantistoj svarmis antaŭ kelkdek jaroj. Prvić atingeblas ŝipe de Šibenik-urbo, naŭdek kilometroj norde de Split. La tuta insulo estas senaŭta speciala kultura heredaĵo.

Nia dudeko enbusiĝis en Zagrebo. La aŭtostrado ŝajnis libera, rapida, sed baldaŭ ĝin plenigis veturiloj el diversaj landoj. La organizanto disdonis al ni altkvalitajn turismajn broŝurojn kun multegaj belaj fotoj. Amuzis nin lia komento "Niaj vojoj estas bonaj sed ŝtopiĝas de eksterlandaj turistoj".

Ni trairis longajn tunelojn, eĉ 7-kilometran, transiris altajn pontojn de unu altaĵo al alia. La kamparo ŝajnis alloga, la vidaĵoj belegaj. Biciklistoj elektu aliajn vojojn, kaj ankaŭ ni devis ŝanĝi itineron por la revenvojaĝo, ĉar tiam la plej longa ponto estis fermita pro fortega vento. Tre instrua ŝanĝo: ni vidis tute aliajn pejzaĝojn, eroditajn, rostitajn de senkompata suno, ravinojn, akvorezervejojn, kavernojn kaj valojn el griza roko. De sur la deklivaj jam antaŭ ses-sep jarcentoj i.a. venecianoj senskrupule hakis la arbaron kaŭzante nekuraĉeblan erozion. "Venecio staras sur niaj arboj." La finan streketon de la kontinento al la insuleto ni veturis en du malfermaj motorboatoj. Sur la strandoj vidiĝis ŝtonmuretoj, konstruitaj dum generacioj por malhelpi la moviĝon de tero kaj humo en maron kaj por marki limojn inter paŝtejoj kaj posedaĵoj.

De la kajo estas nur kelkaj paŝoj al nia hostelo *Peski*, staranta en la ombro de grandaj verdaj mediteraneaj pinoj, nur kelkajn metrojn de la maro, kie sinbanantoj sunumiĝas. La tuta hostelo je nia dispono. Neniuj ŝlosiloj bezonataj. Balkonoj kaj pordoj malfermaj. Vidaĵoj al la bluega golfeto: ŝipetoj,

naĝantoj, ludemaj infanoj; kajakoj kaj bicikloj senpage uzeblaj. En la ĉambroj duetaĝaj litoj, duŝejo, necesejo, tablo, du seĝoj, ŝrankoj. En la manĝejo blankaj tablotukoj kaj punte ornamita antaŭtuketo ĉe la talio de la kelnerino, kiu trifoje tage portas al ĉiuj la manĝaĵojn sur blankaj teleroj. Ofte kolbasetoj, kelkfoje kokidaĵo, porkaĵo, salato, ovaĵo, supo, prunoj, akvomelono, glaciaĵo. Matene kaj dum la tuta posttagmezo kafo kaj infuzaĵo en termosoj.

Ho, ne gravas la manĝaĵoj sed la pura Adriatika maro. Tamen atentu la marajn erinacojn por ne havi pikilojn en viaj piedoj! Lulas nin la trankvilo, kvieto, susuro de la pinaro, ĉirpado de cikadoj. Kelkvespere ĝenas laŭta muziko de la alia bordo de la golfeto, kiam ni esperantistoj ariĝas sur la sofoj kaj foteloj de la teraso. Okazas riĉa koncerto de kroata operkantisto Neven Mrzlečki, prelegoj kun diapozitivaj pri Krasnojarsk, Pollando (Krakovo), kroataj parolturnoj kaj prononco, pri la gazeto *Zagreba Esperantisto*, pri Primošteno, pri finna saŭno. De la fenestro de la manĝejo pendas littuko, sur kiun la prelegantoj komputile reflektas siajn tekstojn kaj bildojn. Ni ankaŭ vizitas la Memorcentron de Faust Vrančić, kiu en la 16-a jarcento elpensis kvindekda de novaj maŝinoj kaj angulan paraŝuton, verkis 5-lingvan vortaron, fariĝis episkopo, diplomato, laŭ sia deziro entombigita en Prvić.

Ni vizitas tri naciajn parkojn. La unua, insularo Kornati, kovras 25,2 kvadratajn kilometrojn, enhavas 109 insulojn, el kiuj 76 areoj po malpli ol unu hektaron. Ili elstaras el la blua sendonda akvo kiel grizaj rondaj kalvaj kranioj, neloĝataj, eroditaj. La plej forajn rongadis la maro dum ŝtormoj, jetante siajn ondegojn sur kaj trans ilin. Videblas grottoj kaj kavaĵoj. Scivolemuloj el inter ni plonĝas en la akvon kun sia spirtubo. Poste ili rakontas, ke ili

vidis koralojn, maranemonojn kaj fiŝojn. Aliaj rondnaĝas en la bluega maro nur por amuzi sin. La kapitano havas tempon atendi. Aliaj turistoj ne videblas.

La nacia parko Krka, 109 kvadrataj kilometroj, sur rivero Krka konsistas el kanjono, akvofaloj, insuletoj, lagetoj, rokoj. La akvofalojn, kaskadojn kaj lagetojn estigas kaj daŭre ŝanĝas travertino, t.e. sedimenta kalkpetro kontakte kun vegetaĵoj. Tiu ĉi grava ornitologia ejo enhavas riĉan flaŭron kaj faŭnon. Aldone troveblas spuroj de pratempaj kulturoj, ruinoj, preĝejoj, monaĥejo, fortikaĵoj, akvomuelejoj. Se oni havas tempon, indas konatiĝi piede kaj ŝipe. Niaj kelkaj horoj neniel sufiĉis por tio.

Plitvice, alia nacia parko el lagoj kaj akvofaloj kovras preskaŭ 300 kvadratajn kilometrojn. Abundas tie plantospecioj (pli ol 1200 el kiuj 75 estas endemiaj), tie vivas papilioj, vespertoj, karnomanĝuloj, ursoj. Tamen oni devus zorgeme plani sian viziton, ĉar la svarmo de la sennombraj vizitantoj malfaciligas la konatiĝon. Ĉie oni devas viciĝi, atendi, atente rigardi siajn piedojn kaj piedfingrojn por ne stumblu aŭ kolizii kun aliaj vizitantoj.

La urbon Šibenik (pli ol 37 mil loĝantoj) ni vizitis negrupe. Ĝi havas longan historion, kie rolas i.a. venecianoj kaj aliaj italoj, francoj (Napoleono), Aŭstria Imperio, Patrolanda Milito (post la disiĝo de Jugoslavio). Kiom multe batalis kaj suferis la popolo, oni povas nur imagi kaj miri. La malnovan kvartalon karakterizas labirinta ŝtuparo sur kruta deklivo. Je ĉiu paŝo la piediranto malkovras interesajn detalojn de arkitekturo kaj spurojn de la pasintaĵoj tra la jarcentoj. La nuno kaj pasinteco intermiksiĝas.

Kroatio ĝoje membriĝis en EU en julio 2013. Tamen malmulte ni scias pri ĝi, la informoj en niaj enciklopedioj kaj eĉ en la reto ne ĉiam validas. Esperantistoj povas iom helpi en la disvastigo de sciigoj kaj travivaĵoj. Kuraĝe partoprenu!

RAVITA DE LA SUDLANDA ETOSO

Kerstin Rohdin

KIE estas Adriatika Feriado?

Adriatika Feriado okazis de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2013 sur la eta bela insulo Prvič en Dalmatio, Kroatio. Ĝi okazas unuan fojon kaj la nomo de la insulo signifas "la unua".

KIO estas Adriatika Feriado?

Renkontiĝoj estas kreitaj de siaj partoprenantoj. En nia unua Adriatika Feriado partoprenis 24 personoj el 12 landoj, ĉiuj bezonataj, por ke bona aranĝo kreĝu. Kompreneble la plej grava el ĉiuj – la bona plananto, aranĝanto, problemsolvanto, bezonata nabo de bone funkcia rado. Bonhumora li ĉiam aŭskultis kaj klarigis pri tio, kion ni ne komprenis, zorgis ke neniu el liaj ŝafoj perdiĝis en altaj montoj, profundaj riveroj kaj valoj. Li zorgis pri bona loĝejo kaj bona kuiristo, kiu bedaŭrinde ne kaptis fiŝon ĉiun tagon, sed tamen bonguste kuiris. Afabla personaro bone servis en la manĝejo kaj en la dormoĉambroj. Ili elturniĝis en la angla lingvo helpe al tiuj, kiuj ne parolis kroate. Ĉiuj ja estas bazo en bona renkontiĝo.

La partoprenantoj montris diversajn talentojn kaj personecojn, kio kreis agrablan etoson dum la semajno. Troviĝis LA REĜINO, kies nura apero en la ejo kolektis ĉiun atenton ĉirkaŭ si. Ŝi estis potenca reĝino, kiun la viroj portis sur siaj manoj kaj adoris. Kun digno ŝi kapablis "porti" tion. Troviĝis LA REĜO NEPTUN aŭ s-ro Hemingway, kiu dum boatvojaĝoj "stiris" la boaton de sur la busprito. Samtempe instruante knabineon pri la sekretoj

de la maro kaj de la vivo. Li estis reĝo de la akvoj kaj de la virinoj. Li protektis "la brava old lady", kiu iam konis Anna Alamo, vigla eksterlanda instruistino, kiu iam instruis Esperanton en Jugoslavio, Slovenio. Ŝi tuj, jam dum ni atendis la boaton, kiu veturigu nin al la insulo Prvič hazarde ekparolis kun ŝi, kiu devenas de la sama lando, de kie venis Anna Alamo. Ŝi tre ĝojis pri tio eĉ pli, kiam ni parolis pri la signifo de la nomo Al amo. La SLOVANINO dediĉis sian vivon al esperanto, multon laboris, instruis, diversmaniere prosperigis la internacian lingvon en sia regiono. Ĉirkaŭ ŝi, dum ŝi rakontis pri tio, radiis la saman energion, esperon kaj ĝojon, kiel radiis Anna Alamo. Krome ŝi ĵus ekstaris de malsanula lito por havi la eblecon partopreni la unuan Adriatikan Feriadon. Ni devas ne forgesi tion, kion faris niaj antaŭuloj por prepari la vojon por esperanto, nun kiam ĝi jam vivis 125 jarojn. DEC faras grandan laboron por kolekti tion, kio estas farita. Zofia Banet Fornalowa dediĉis multon de sia vivo por kolekti kaj ordigi Esperanto-faraĵojn. Mi substrekas, ke estas grave konscii kaj memori pri nia historio.

Kompreneble ĉeestis ĴURNALISTINO de la enhavoriĉa kaj belaspekta ZAGREBA ESPERANTISTO. Ŝi faris longan intervjuon pri "Emilo en Smolando", kiu ĵus celebris sian 50-jaran naskiĝdatrevenon kiel rolanto en libro. La intervjuo okazis sur teraso ĉe la Mediteraneo en varma subluna vespero. Por kolekti materialon al sia artikolo la ĵurnalistino preparis sin per legado de "Emilo en Smolando", legado de prelego pri "La verkoj de Astrid

Lindgren", kiu estas prezentita plurloke en la mondo. Ŝi jam konis la belan libron "Fratoj Leonkoro" en esperanto. En esperanton estas tradukitaj krom la supre menciitaj, "Pipi Ŝtrumpolonga" kaj "Mio mia filo". Estis longa interesa interparolo dumvespera inter la ĵurnalistino kaj la tradukistino (de du el ŝiaj libroj)/prelegantino pri Astrid Lindgren.

Dumvespere okazis diversaj programeroj de plej norde ĝis sude. KRASNOJARSKANO prezentis per pluraj fotoj sian grandegan froste malvarman kaj neĝoplenan regionon. Li rakontis, ke ekzistas pluraj universitatoj en la regiono kaj rakontis pri kiel li mem laboras pri robotoj. La regiono de Krasnojarsk estas kvaroble pli granda ol Francio. Li rakontis kiel malvarmaj estas tie la vintroj, kiel mallongaj estas la someroj kun la famaj blankaj noktoj. NORDLANDANINO aktore kaj vigle priskribis kiel ŝi kun siaj samlandanoj kontraŭbatalas la malvarmon en sia lando. La plej grava kaj sankta loko de la hejmo jam ekde malnova tempo estas la saŭno. Nur tie oni povas krei varmon kaj purigi sin post la malpuriga laboro en la vastaj arbaroj. Kiam oni konstruas al si hejmon, la unua parto, kiu estas konstruita estas la saŭno. Malnovtempe oni naskiĝis en la saŭno, oni mortis en la saŭno. Ankoraŭ nuntempe oni invitas gastojn por kune nude saŭnumi. La saŭno estas la ejo ĉirkaŭ kio la vivo turniĝas, kaj oni eskapas en ĝin for de la vintraj frostoj. Alian vesperon ni vizitis la kulturplenan urbon KRAKOVON, promenadis per belaj fotoj inter la historiaj kasteloj, remparoj, katedralo kaj la fama Vendoplaco, kiu eĉ antaŭ la mezepoko estis la ĉefa vendoplaco de Meza Eŭropo por sukceso, pelto kaj multo alia. Kelkaj el ni plej ĝuis naĝadon, aliris en la akvon! ETA MARVIRINO frue, malfrue.

Kelkaj multe progresis en la lingvoscio kaj revenis hejmen



kun la sento, ke ili fariĝis pli spertaj en esperanto kaj ke ili ricevis novajn geomikojn en Esperantujo. Unu aĉetis "Eduko Danĝera" verkita de Harold Brown entenante esperante verkitaĵojn, kiuj eble interesas ŝian filinon, kiu prezentas teatraĵojn en la franca lingvo.

Certe la plej granda evento estas prezentado de profesia operakantisto, NEVEN MRZLEČKI, kiu lasis sian voĉon pleniĝi la tutan ĉirkaŭaĵon. La kantoj parte tradukitaj de li mem sonis en bela esperanta lingvaĵo.

Niaj belaj ekskursoj en

naturparkoj kreitaj en miraklaj formoj per kretrokoj kaj akvoj estis belaĵoj, kiujn mi neniam vidis. Povas okazi, ke ADRIATIKA FERIADO denove volas kolekti gastojn en la sama loko. Tiam ne maltrafu ĝin rekomendas nordlandano, kiu estis ravita de la sudlanda etoso.

INSTIGO POR DENOVE VIZITI KROATION

 Adam Wilkus

Inter la 3-a kaj la 10-a de aŭgusto 2013 okazis en la vilaĝo Prvić Luka (kies nomo estas nomo libere tradukebla kiel "Unua Haveno") la unua Adriatika Feriado. Alvenis gastoj el kelkaj landoj de Eŭropo: Belgio, Francio, Svislando, Pollando, Ĉeĥio, Slovakio, Finnlando, Svedio, Slovenio kaj Kroatio. Venis ankaŭ esperantisto el fora Siberio (Rusio).

Prvić Luka situas sur la insulo Prvić proksime al la historia urbo Ŝibenik en Dalmatio, la suda regiono de Kroatio, kiu juŝ fariĝis membro de Eŭropa Unio. Ĉirkaŭ la insulo, sur kiu troviĝas nur du tipe fiŝkaptistaj, trankvilaj vilaĝoj, fluas varma kaj pura akvo de Adriatika maro, en kiu la partoprenintoj naĝis kun granda plezuro. Dum la aranĝo oni povis sperti la vivplenan naturon: la varman maron loĝatan de fiŝoj, birdoj kaj aliaj marbestoj kaj la fruktodonajn plantojn kultivatajn sur la insulo kiel, ekzemple, vinberoj, figoj, granatoj, olivoj kaj rubusoj (nigraj arbaraj beroj). Bele odoris lavendo kreskanta tie. Videblis floro de kaktosimila agavo, kiu tre malofte aperas.

La programo de la unua AF estis abunda. Krom ripozado ĉe la maro, vizito al la alia surinsula vilaĝo Ŝepurine (perpiede aŭ biciklante), promenado aŭ kajakumado ĉirkaŭ la insulo (preter kvar kapeloj starantaj apud

la marbordo kiel montriloj al la kvar flankoj de la mondo (unu el ili enhavas interesan bildon de damo kiu tenas teleron el kiu elrigardas du okuloj), okazis koncerto de la kroata artisto Neven Mrzlečki kiu bele ludis gitaron kaj kantis, interalie de si mem Esperantigitajn kantojn. Poste mi aĉetis lumdiskon kiu enhavas liajn belajn kantojn. Ni rigardis la Esperantigitan filmon "La Universala Lingvo" de Sam Green kaj pridiskutis la prezentitajn faktojn, opiniojn kaj ideojn. Dum la prelegoj okazintaj vespere, la partoprenintoj eksciis de Josip Pleadin pri la vivo kaj verkoj de la mondvojaĝanto kaj esperantisto Tibor Sekelj (naskita en Slovakio) kaj povis aĉeti la noveldonitan libron "Padma, la eta dancistino". La preleganto prezentis ankaŭ la pri-maran poezion kaj la gazeton "Zagreba Esperantisto". Raita Pyhälä "Saliko" el Finnlando konigis al la partoprenintoj per belaj bildkartoĵoj diversajn lokojn kaj tipajn aferojn de sia lando kaj interese rakontis pri saŭno. Pavel Lopatin kaptis atenton de ĉiuj rakontante pri Krasnojarska regiono de fora Siberio. La aŭtoro de ĉi tiu raporto kun helpo de Anita kaj Josip Pleadin prezentis kurseton de la kroata lingvo per bazaj esprimoj, projekciis fotojn kaj poŝtmarkojn pri kroataj birdoj kaj prelegis pri Krakovo - la iama ĉefurbo de Pollando. Fine de

la prelego okazis kvizo kun premioj, en kiu ĉiu partoprenanto ion gajnis. La feriantoj ĝuis ankaŭ ekspozicion de fotoj faritaj de esperantisto Ivica Ŝĉepanović, kiu loĝas sur la proksima insulo Braĉ.

La partoprenintoj vizitis la novkonstruitan muzeon de Faust Vrančić - genia persono, kiu pasigis sian infanaĝon sur la insulo Prvić. Li kreis la unuan kvinlingvan vortaron en Eŭropo, kaj inventis, interalie, praktike uzeblan paraŝuton, plibonigante kaj realigante la ideon de Leonardo da Vinci.

Dum libera tempo kelkaj homoj vizitis la proksiman urbon Ŝibenik, grimpite sur la muregojn de la fortikaĵo el kiu bone videblas la tuta ĉirkaŭaĵo kaj la interesa optika iluzio prezentiga al spektanto: la akvo malantaŭ la granda roko ŝajnas esti je pli alta nivelo ol la akvo antaŭ ĝi, kvankam temas pri la sama maro. Vizitindas la belega katedralo, kiu apartenas al la monda kulturheredaĵo (listigita de UNESKO).

Okazis ege interesaj ekskursoj al tri naciaj parkoj:

1. La arkipelago de Kornati kun interesaj formoj de insuloj, kie loĝas nur kelkaj homoj, ŝafoj, kormoranoj kaj laroj. La ekskursantoj ĝuis naĝadon en la maro apud insulo. Ne mankis aventuro! Revenante, la kapitano rapidigis nian boaton "por helpi al

homoj de ĵus rompita ŝipo”).

2. Nacia parko Krka (sur la samnoma rivero) kun grandiozaj akvofaloj, abunda flaŭro kaj faŭno.

3. La lagoj de Plitvice kun akvofaloj, multe da verdaĵo, kaj rara karsta fenomeno de tavolo de kalktofo.

Por mi estis interesa ankaŭ la individue farita ekskurso al ornitologia naturrezervejo ĉe *Vransko jezero*, la plej granda natura lago de Kroatio, kiu najbaras al la maro. La sala mara kaj la dolĉa laga akvoj kelkfoje miksiĝas Ĉe la lago vivas multaj eksterordinaraj birdoj kiujn eblas observi promenante laŭ kelkajn kilometrojn longa ligna ponteto. Proksime troviĝas arkeologia eltrovaĵo de antikva preĝejo, verŝajne parto de iama pli granda setlejo.

Fani Rižnar el Slovenio uzis la feriadon por viziti la proksime troviĝantan Primoštenon, iam famegan pro la Esperanto-kampadejo.

Kelkaj feriantoj profunde esploris la insulon Prvić, trovante interesajn lokojn kaj konatigante kun lokaj homoj, inter kiuj estas multaj maristoj.

Ĉar dum la feriado okazis la nacia festo de Kroatio (Tago de Patruja Danko) iuvespere oni festis en la haveno de Prvić per koncerto de popmuziko, dancado kaj senpaga gustumado de frititaj fiŝoj per kiuj la loĝantoj de la vilaĝo Prvić Luka regalis ĉiujn turistojn. Alian koncerton prezentis al ni dumtage la cikadoj pri kiuj cirkulas onidiro, ke ili manifestas vivon per sia muziko, kaj dum la unua nokto kontribuis per sia voĉo la birdeto nomata noktuo (kiu post sia koncerto, bedaŭrinde, forflugis - ĉu tio estas kutimo de ĉiu artisto?).

En la hostelo servis nin simpatia dommastrino, kelnerino kaj kuiristo Novica Štefanić, kiu estas ankaŭ volontula fajrobrigadisto kaj kiu zorgis pri multaj aferoj en la hostelo, inkluzive pri funkciado de sendrata interreto. Li partoprenis unu ekskurson kune kun la feriantoj kaj sukcese lernis kelkajn

Esperantajn esprimojn. Espereble li fariĝos vera esperantisto kaj venontjare povos jam libere komuniki kun partoprenantoj pere de la Internacia Lingvo.

Plaĉis al mi la bongustaj fruktoj kiujn ni ricevadis kelkfoje kiel deserton post tagmanĝo, ekzemple piroj kaj akvomelono. Mi volonte gustumis ankaŭ vinberojn. Akvoriĉaj fruktoj gravas dum varma vetero kiu akompanis nin la tutan tempon. Mi bedaŭras, ke la feriado jam finiĝis, ĉar mi ŝatus plue naĝi en la refreŝiga maro aŭ en la lagoj kiuj enhavas tre puran akvon en kiu klare videblas fiŝoj kaj aliaj marestaĵoj.

Markéta kaj mi kune ĝuis la feriadon kaj estas tre kontentaj pro la ebleco sperti tiom multe dum tiel mallonga tempo. Plaĉis al ni la bela vetero, naturo, vizitindaj lokoj kaj simpatiaj partoprenintoj de Adriatika Feriado en Prvić Luka. Oni tre bone elektis la feriejon sur la insulo, ĉar ĝi troviĝas proksime al multaj vizitindaj lokoj kaj ofertas diversajn eblecojn por ripozi (naĝado, sunumado, promenado, biciklado, kajakumado, boatumado, eventuale paraŝutglisado). Tiu ĉi somera aranĝo estas ege partopreninda. Ni jam sopiras viziti Kroation ankoraŭ foje.

Dum venonta vizito al Dalmatio mi ŝatus gustumi ankaŭ tradician manĝon de ĉi tiu regiono nomatan “dalmatinska peka” (plado kun viandajo kaj legomoj, preparita en pota aŭ pleto, per rostado en la cindro de kameno, kiu troviĝas en tradiciaj domoj en Dalmatio) kune kun loke produktita vino aŭ brando (“rakija”), kion ĉi-foje mi ne povis pro uzado de antibiotiko. Volonte mi rigardus lokajn folklorajn dancojn aŭ aŭskultus vivnaturan prezentadon de “klapa”-muziko (tradicia grupa kantado en Dalmatio, foje akompanata de milda gitaro kaj mandolino). “Klapa” estas muzikgrupo kutime formita el dekduo da viraj kantistoj, kvankam lastatempe inaj vokalaj grupoj fariĝis sufiĉe popularaj. La vorto “klapa” tradukeblas kiel “grupo de amikoj”.

Tiun tipon de muziko Kroatio ĉi-jare elektis por reprezenti la landon en la Eŭrovizia Kantokonkurso. Iam mi ŝatus viziti ankaŭ aliajn lokojn ĉe la marbordo de Kroatio, interalie la plej malnovan urbon de Dalmatio – Dubrovnik, la Nacian parkon Paklenica apud la urbo Zadar, kaj proksime troviĝantan vilaĝon Smiljan, el kiu devenas la fama elektroinĝeniero kaj inventisto Nikola Tesla, kies muzeo nuntempe troviĝas en la vilaĝo. Estus interese provi paraŝutan glisadon super boato rapide veturanta tra la maro, kiun mi vidis inter la insulo Prvić kaj la proksima urbeto Vodice. Estus interese viziti la falkejon “Sokolski cetnar” proksime al Šibenik.

Veturante tra Zagreb ni vizitis la Muzeon de Neandertala Homo en la proksima urbo Krapina, kiu prezentas ne nur arkeologian esploraĵon sed ankaŭ la evoluon de homa penso pri kompreno kiel nia mondo funkcias kaj kontribuo de tiaj personoj kiel ekzemple Nikolao Koperniko, Karolo Lineo kaj Karolo Roberto Darvino. Ni renkontiĝis kun la agrabla familio de Zlatko Tišljar, kiu ĉiĉeronis tra la ĉefurbo de Kroatio, kaj ni gustumis la bongustaĵojn preparitajn de lia edzino Ruža. Mi ŝatus viziti ankaŭ la naturrezervejon Lonjsko polje, kiu troviĝas en la ĉirkaŭaĵo de Zagrebo. Tie vivas, interalie, kulerbirdoj kaj cikonioj. En la urbo ni promenis, interalie, tra la strato de barono Trenk, kroato kiu iniciatis la modon porti modernan kravaton.

Ripozante dum mia libertempo plej volonte mi legas librojn tute aliajn ol estas la faka teknika literaturo kiun mi preskaŭ ĉiutage bezonas legi en mia laborejo. Mia ŝatata literaturo por ripozi kaj plibonigi imagkapablon (ege gravan en mia laboro) estas legendoj, aventurromanoj, vojaĝraportoj kaj foje krimromanoj. Pro tio mi tre ĝojis ricevinte la kroatan rakonton “Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić”, esperantigitan de Maja Tišljar.

ESPERANTISTOJ REVENAS AL DALMATIO

✍ Davor Grgat

Dum kelkaj jardekoj en Dalmatio apenaŭ okazis iu Esperanta aranĝo. Kelkaj dalmatianoj tiun fakton komentis kiel ignoradon de Dalmatio flanke de kroataj esperantistoj, kaj en Split estis lanĉita eĉ la ideo pri organizado de dalmatia Esperanto-kongreso. Foresto de Esperantaj aranĝoj estas la malo de la iama svarmo de esperantistoj en Dalmatio. Ekde 1961 preskaŭ ĉiu esperantisto en kiu ajn mondoparto sciis pri la Esperanta kampadejo en Primošteno. Ĝi estis la fenomeno de ĝis tiam nespartita intensa Esperanta turismo.

La neenviindan "tradicion" de neokazigo de Esperantaj aranĝoj, ĉesigis ĉi-jare "Adriatika feriado", okazinta en la proksimeco de Primošteno, la iama esperantista turisma Mekko. Dudeko da esperantistoj, kiel la unuaj hirundoj anoncis revenon de esperantistoj en ĉi tiun belan kaj por feriado agrablan regionon. Ili kolektiĝis en la malgranda insulo Prvić, en la arkipelago de Ŝibenik.

Verŝajne la nomo de Prvić estas konata al tre malmultaj esperantistoj. Nemirinde, ĉar la insulo havas la areon de nur 2,37 kvadrataj kilometroj, kaj nur 400 loĝantojn. Krom kelkaj esperantistoj kiuj en ĉi tiu insulo vivis antaŭ la dua mondmilito, Esperanto tre malofte estis aŭdebla ĉi tie.

Sur la insulo ekzistas nur du vilaĝoj: Prvić Luka kaj Ŝepurine. La nomo de la insulo signifas "la unua", ĉar ĝi estas la unua (loĝata) insulo kiun oni povas atingi el Ŝibenik. La insulo estis loĝata tre frue, kaj en la proksimeco de la loka preĝejo en Prvić Luka estas trovita romia tegolo, kio konfirmas ke la insulon konis ankaŭ romianoj. Ekde la mezepoko la insulo estis

rifuĝejo de nobeloj el Ŝibenik, kiuj fuĝis antaŭ la pesto. Ili luprenis la surinsulajn terparcelojn de la komunumo kaj per tio malfermis la eblecon de iom-post-ioma loĝigo de la insulo. Tiun proceson oni povas historie sekvi ekde la 14-a jarcento, sed la plej granda ondo de almigrintoj venis en la 15-a jarcento, pro la turkaj atakoj, antaŭ kiuj la loĝantaro de la granda mezepoka urbo troviĝinta en la nuna marborda vilaĝo Srima, translokiĝis al Prvić kaj fondis la vilaĝon Ŝepurine. Dum la sama jarcento la insulon ekloĝis ankaŭ franciskanoj. Kaj en la jaro 2013 ... esperantistoj!

Kelkaj "almigrintaj" esperantistoj jam demandis la organizantojn de "Adriatika feriado", ĉu tiu ĉi aranĝo signifas renaskiĝon de Primošteno, pri kiu la nostalgioj ankoraŭ ne velkis ĉe pliaĝuloj, dum pli junaj generacioj aŭskultas iliajn rakontojn kiel

fabelojn. En la "Adriatika feriado" tian fabelon pri sia vojaĝo al Primošteno okazinta antaŭ duonjarcento, rakontis la svedino Kerstin Rohdin.

Establi konstantan renkontiĝejon por esperantistoj en Prvić, jam ne plu estas nur fantazia revo, sed tute reala ebleco.

"Adriatika feriado" estis organizita pro kelkaj koincidoj. Unu el ili estas, ke jam post la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj en Koprivnica estis klare, ke la 11-a kongreso ne okazos. La dua afero kiu pozitive influis la okazigon estas, ke la Urbo Ĝurđevac posedas en Prvić Luka hostelon kun kvardeko da litoj, kiun ĝi afable ofertis al Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) el Ĝurđevac por tie organizi siajn programojn. Decidinte esplori la eblecojn, DEC organizis la unuan feriadon de internacia grupo de esperantistoj.



Fotosaluton al la partoprenantoj de Adriatika Feriado sendis la Esperanto-klubo el São Carlos, Brazilo



Adriatika





ESPLORE PRI AŬSTRALIA ESPERANTISTO JOHN MATASIN (2)

Josip Pleadin

LA DUA EDZINO EVA MARX

Rezulte de sia restado en Leipzig, **Ivan Matašin** konatiĝis en 1924 en loka Esperanto-societo kun **Eva Marx**. Pri tiu esperantistino mi klopodis trovi ian ajn informon en malnovaj gazetoj. “Germana esperantisto” el la jaroj 1924-1928, nenie mencias **Eva Marx** aŭ **Ivan Matašin**. En “Esperanto Triumfonta” el la jaro 1923 ekzistas listo de kongresanoj de la nurenberga kongreso, sed mi nenie trovis la nomon de **Matašin**. En la numero 119 mi trovis la informon pri donaco de f-ino **Marx** el Dresden (100 gm), sed poste montriĝis, ke temas pri **Charlotte Marx** (KN 597), do ne pri la serĉata **Eva Marx**. Pli konkretajn informojn pri Eva ne povis doni ankaŭ **Detlev Blanke**. Mi kontrolis en la “Esperanto-revuo” de UEA (1929 kaj 1930),



Eva (Marx) Matasin (la tria de maldekstre) dum iu ekskurso de aŭstraliaj esperantistoj

kie kutime oni publikigis informojn pri privata vivo de esperantistoj, sed ankaŭ tie oni ne mencias ion ajn pri la paro **Matašin/Marx**.

Tamen, jam antaŭ la veno al Aŭstralio, **Ivan Matašin** kaj **Eva**

Marx estis gefianĉoj (en 1928). Ili geedziĝis en Aŭstralio en la jaro 1929. Dum kun sia unua edzino **Ivan** ne havis infanojn, kun **Eva** li havis la filinon **Vera** edziniĝintan al **Rollo Charles Henderson**, kaj la filon **Ronnie** (kiu restis fraŭlo). **Ronnie** estis tre talentita por lingvoj, kaj **Ivan** diradis, ke li devus dediĉi sin al diplomata servo, sed li frekventis nur realernejon. Li provis studi, sed sensukcese.

ALVENO AL AŬSTRALIO

Laŭ iuj informoj **Ivan** ekvojis ekstereŭropon en 1927, sed laŭ alia, pli preciza informo, li enmigris Aŭstralion nur en oktobro 1928. Mia taglibra noto aludas, ke li ne venis rekte al Aŭstralio, sed ke li vojaĝis unue al Suda Ameriko, supozeble al Argentino (kiel antaŭe li planis kun **Roko Pavoković**), kien cetere tiutempe elmigris multaj kroatoj. Lia fianĉino **Eva**, venis Aŭstralion nelonge post li. Tio



La familio Matasin kun amikoj-esperantistoj, fotita en julio 1940 en sia hejmo. De maldekstre sidas s-ino Eva Matasin, s-ro Hyde, s-ro Joab Eljot, (supozeble) s-ro Frank Banham el Melburno, s-ro Paul Schwerin, s-ro John Matasin, kaj la sidantaj infanoj estas gefiloj de gesinjoroj Matasin, Vera kaj Ronnie.




La domo de la familio Matasin en Coorabian Road en Sidnejo

signifas, ke ili verŝajne gefianĉiĝis en Suda Ameriko, sed temas nur pri miaj supozoj.

KIALOJ DE SUKCESO EN AŬSTRALIO

En Aŭstralio la unuaj al **Ivan** helpis lokaj esperantistoj, kaj tiun helpon li pluroble reciprokis al la aŭstralia movado en postaj jaroj. Tuj post la enmigro li malfermis malgrandan remburistan laborejon. La granda ekonomia krizo ne estis favora tempo por investoj, aparte ne en produktado de mebloj kiuj fariĝis tro multekostaj, sed Ivan havis ideon kiel produkti malmultekostan meblaron, kiu estis facile vendebla ankaŭ en la tempo de granda krizo. Tiel li rapide progresis kiel mebloproduktisto kaj riĉiĝis. Per la akirita mono li aĉetadis domojn, kiujn li poste ludonadis, kaj tiel ankoraŭ plioblis sian havaĵon, kiu garantiis al li senzorgan maljunecon. Jam en la "fruaĵ 1930-aj jaroj", kiel tion informas la aŭkcia reklamo, **John Matasin** kaj lia edzino aĉetis grandan domon kaj terenon ĉe la adreso *1 Coorabin Rd* en Sidnejo, en la tempo kiam ankoraŭ ne ekzistis la havenponto

kaj la urboparto *Northbridge* estis konsiderata kamparo ekster la urbo. La domo estis konstruita en 1920-aj jaroj, kaj posedis 5 dormoĉambrojn, 2 banĉambroj kaj superan etaĝon por du familioj. Post la morto de **Ivan** kaj lia edzino, la domon uzis ilia nepo **Mark Henderson** kun sia edzino **Anne**, kiuj vendis ĝin en aŭkcio en la jaro 2009.



Unu el "akcioj" de John Matasin por aĉeto de Esperanto-Domo.

ESPERANTISTO

Origine **Ivan** estis membro de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kaj kvankam li neniam forlasis la SAT-membrecon, post la dua mondmilito li "konvertiĝis" al membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA). En la Jarlibro de SAT mi trovas mencion pri li en la jaro 1948 ĉe la adreso *1 Coorabin Rd*, sed mi ne posedas ĉiujn jarlibrojn de SAT, nek sukcesis ilin konsulti. Tamen, jam en la 1950-aj jaroj la jarlibroj de SAT ne plu mencias lin.

Por la unua fojo la Jarlibro de UEA mencias **John Matasin** en 1954 kiel lokan delegiton, laŭprofesie meblofabrikiston ĉe la adreso *1 Coorabin Road, Northbridge, telefono MX 1227 aŭ XL 1748*. Kvankam mi ne kontrolis ĉiujn jarlibrojn, la lasta Jarlibro de UEA en kiu li estas notita, estas tiu el la jaro de lia morto, 1980. Supozeble li estis loka delegito de UEA en Sidnejo dum 26-27 jaroj.

AĈETO DE ESPERANTO-DOMO

En Sidnejo la unua Esperanto-societo estis fondita en 1909. En 1960 **Matasin** estis kunfondinto, kaj kun s-ro **Feldmayer**, verŝajne la plej grava membro de la Kooperativo, kies celo estis aĉeti propran domon por **Sidney Esperanto Society**. La domo estis aĉetita per monpruntoj de esperantistoj, kiuj poste estis repagitaj. La Esperanto-Domo en Sidnejo troviĝas en *143 Lawson Street* en *Redfern*, kaj nuntempe ĝi apartenas al Novsudkimruja Esperanto-Federacio.

Post la aĉeto de la domo, la duopo **Feldmayer** kaj **Matasin** komplete renovigis ĝin kaj pruntis monon por konstrui fabrikon malantaŭ domo, kies celo estis havigi monon por funkciado de la



La Esperanto-Domo en Sidnejo

Domo. **John Matasin** estis "bona spirito" de la tuta entrepreno, kaj la veterana esperantistino **Eunice Graham** el Manlio eĉ asertas, ke **Matasin** mem konstruigis la fabrikon malantaŭ la Domo. Dum dudek jaroj li deĵoris en la domo kiel ĝia direktoro.

Pro lia evidenta kontribuo en la aĉetado kaj prizorgado de la Domo, la sidneĵaj esperantistoj en la domo starigis specialan plakedon kiel memoron pri li.

ALIAJ ESPERANTAJ AKTIVECOJ DE MATASIN

Tiun parton de la vivo de **Matasin** estas plej malfacile rekonstrui, kaj ĉi tie menciitaj estas nur mozaikeroj neniel prezentantaj la tutan bildon.



La omaĝplakedo al John Matasin en la Esperanto-domo en Sidnejo

Lia bona amiko **Wolo Gueltling** estas la sola kiu nuntempe kapablas doni pli konkretajn informojn. **Wolo** konatiĝis kun **John** en 1955, kiam li enmigris Aŭstralion el Germanio. Ili fariĝis bonaj amikoj kaj ĉiam interparolis en Esperanto. Jam en 1956 **Ivan** veturigis **Wolon** al lia unua aŭstralia Esperanto-kongreso (Canberra, januaro 1956).

Wolo atestas, ke **John** estis malavara, kaj ofte pruntadis



Malfermo de Aŭstralia Esperanto-kongreso (Melburno, 1964). De maldekstre sidas: I. Maddern (Morwell), E. McKenzie (Melburno), J. Matasin (Sidnejo), K. Linton (Melburno), M. Leereveld (Melburno), H. Koppel (Melburno kaj Ross Robins (Kanbero)



Multjaraj amikoj Wollo Guetling kaj John Matasin



Gazetartikolo el 1979 aperinta en "Manly Daily" kun foto de John Matasin vizitita de Ivo kaj Ljuba Lapenna


monon seninterese. Kiam **Wolo** volis aĉeti loĝejon, **Ivan** pruntis al li 75% da bezonata sumo.

John multe helpis organizi la 8-an tutaŭstralian Esperanto-kongreson en Sidnejo (1951), ĉe kiu li ricevis de la kongresanoj la ŝercnomon "la motorigita esperantisto", pro la granda aro da "maŝinoj", kiujn li disponigis al la kongreso: sian privatan aŭtomobilon li disponigis kiel taksion por veturigi la kongresanojn, sian ŝarĝaŭtomobilon li pruntis por tuttaga ekskurso, sian skribmaŝinon li uzis por kongreslaboroj, lia voĉregistrilo provizis distron kaj amuzon ĉe du festvesperoj, kaj lumbildaparato kune kun du filmaparatoj savis la filmvesperon kiam la komitato ne ricevis la promesitajn filmojn. Pli detale oni povas legi en *Heroldo de Esperanto* n-ro 1155. Li filmis kelkajn aŭstraliajn Esperanto-kongresojn. Li videblas en la komuna foto farita en Perth dum la 9-a aŭstralia Esperanto-kongreso, pri kiu raportis *Heroldo de Esperanto* n-ro 1192.

En septembro 1959 John entreprenis familian vojaĝon al Hindujo, kie akceptis ilin ankaŭ la UEA-delegito en New Delhi **Veerendra Adhiva**. Pri tiu evento skribis la slovenlingva gazeto "Obzornik" en 1961 jene: "En septembro 1959 la aŭstralia esperantisto s-ro John Matasin vizitis Hindujojn. Survoje al Kaŝmiro, lin kaj lian familion gastigis ankaŭ Veerendra Adhiva, delegito de UEA en New Delhi".

Rememorojn pri **Matasin** verkis ankaŭ kroata esperantisto **Milan Sudec** en sia libreto "Esperanto - mia akompananto" (paĝoj 20 kaj 21).

En 1974 **John** kaj **Eva** vojaĝis al Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo, kaj fine de la vivo ili entreprenis familian ĉirkaŭmondan vojaĝon. En Hispanio, laŭdire, **John** fondis vilaĝon



Nekrologo de John Matasin en "Telopeo" en 1980

en kiu ĉiuj parolis Esperanton, sed pri tio mankas konkretaj pruvoj. Mi estus danka al legatoj de ĉi tiu artikolo, kiuj eventuale scias ion pri tiu temo, se ili disponigus tiujn

informojn al mi.
Kun sia edzino **Eva, John** plurfoje vizitis la naskiĝvilaĝon, foje ankaŭ kun la filo **Ronnie**. Bedaŭrinde, la gepatroj

de **John** relative malriĉe vivis dum la lastaj vivojaroj, kaj ili preskaŭ divorcis. La patrino vivis kune kun la plej juna filo **Filip** en la naskiĝdomo, kaj la patro en la domo de alia filo **Mato**.

Laŭ **Eunice Graham** el Manlio, **Matasin** estis membro de Pasporta Servo, kio al mi ŝajnas neĝusta. Pli ĝuste estus aserti ke li gastigis homojn en sia domo. Konatas ke li renkontis, kaj en sia domo gastigis multajn gravajn personojn de Esperantujo, interalie **Ivo Lapenna**, lian duan edzinon **Ljuba**, kaj la mondŝaman esploriston **Tibor Sekelj**.

FORPASO

John Matasin mortis la 2-an de aŭgusto 1980 en Sidnejo (Aŭstralio), kaj lia edzino **Eva** kelkajn jarojn poste.

ESPERANTO-KONFERENCO Fani Rižnar

DE ALP-ADRIO

La ĉefa temo de la 17-a Esperanto-konferenco de Alp-Adrio, okazinta en Izola (Slovenio) inter la 31-a de majo kaj 2-a de junio estis "Izola, paca kunlivejo de tri kulturoj". La konferencon preparis la organiza komitato havinta sian sidejon en Triesto (Italio), kaj la surloka respondeculo kaj organizanto estis Fani Rižnar, la multjara slovena esperantistino kaj membro de la organiza komitato.

La 33 partoprenintoj venis el ses landoj (Italio, Aŭstrio, Hungario, Germanio, Kroatio kaj Slovenio). La malferma ceremonio okazis en la malgranda salono de Centro por kulturo, sporto kaj manifestacioj. La konferencanojn salutis la urbestro de Izola, magistro Igor Kolenc kaj la sekretariino de la organiza komitato s-ino Edvige Ackerman, post kio sekvis salutoj



de ĉiuj reprezentitaj landoj.

La konferenca tempo estis dediĉita al kultura kaj etika originaleco de urbo Izola kaj ĝia mallarĝa regiono.

En la kultura programo debutis Marjetka Popovski kun la virina kantgrupo "Floro en la haroj" kaj la virina kantgrupo "Ivan Grbec Škedenj" gvidita de Silvana Gregorič, kiuj prezentis kelkajn kantojn slovene, itale kaj Esperante.

Precipe interesa programero estis la "Neptunaj ludoj",

kiujn gvidis Dare Brezovšek. Fine kantis kaj gitarludis Drago Mislej-Mef.

En la postagmeza konferenca programo estis prezentita mallonga historia trarigardo de la ĝisnunaj konferencoj (okazintaj inter 1989 kaj 2013).

La membro de la konferenca organiza komitato por Slovenio, s-ino Fani Rižnar finis sian mandaton kaj proponis kiel novan slovenan membron s-ron mag. Anton Mihelič.

ESPERANTA MOZAIKO

 Redakcia kompilo

Dinko Matković el Vrboska (insulo Hvar), partoprenis la 86-an SAT-kongreson en Madrido (Hispanio) inter la 28-a de julio kaj 4-a de aŭgusto 2013. La programon li kontribuis per prezento de sia libro pri aforismoj "333 cerbaj impulsoj".

La 13-an de aŭgusto estas registritaj ŝanĝoj de la Statuto de Kroata Esperanto-Ligo akceptitaj en la jarkunveno la 8-an de junio.

Someran Esperanto-lernejon "Esperanto kaj lingva egaleco" en Krževci gvidis **Krunoslav Puškar** inter la 15-a kaj 20-a de julio. Samkiel pasintjare ĝi havis kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Partoprenis 11 personoj.

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) eldonis kvarvoluman (pli ol 1000-paĝan) kroatlingvan memuarverkon de sia membro **Nikola Turk** titolitan "Tri koščice - kvarat mesa" (Tri ostetoj - kvarono da karno).

Kunlabore kun Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj (KUNE) el Zagrebo, Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) eldonis soneldonon de "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić". La tradukon de **Maja Tišljar** voĉlegis **Spomenka Štimec**. La KD-on ilustris **Ivica Milovan** kaj sponsoris *Refill bar* el Zagrebo.

"Grafokom" el Đurđevac eldonis originalan poemaron "Cigna kanto" de **Josip Pleadin**. Temas pri sesdeko da poemoj verkita en la periodo 2008-2012, inkluzive de poemoj premiitaj en

la Belartaj Konkursoj de UEA. La poemaro estis unufoje prezentita en la "Adriatika feriado" en Prvić Luka, kaj sekvas ĝia prezento en la Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj en Hraščina, la 14-an de septembro.



Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) kiel eldonanto, kaj tri aliaj societoj (Bjelovara Esperantista Societo, Esperanto-societo "Sisak" kaj Esperanto-societo Petrinja) kiel kuneldonantoj,

eldonis kolekton de rakontoj pri urbo Petrinja, kiujn en la kroata verkis konata forpasinta esperantistino Marija Horžinek. Kroatlingva titolo de la eldono estas "Grad lipa", kaj eldonis ĝin Filio de Matica hrvatska en Petrinja en la jaro 1997. Esperanten tradukis la rakontojn Josip Pleadin, kaj la libro aperis sub la titolo "La Tilia Urbo". La libro prezentas omaĝon al la aŭtorino. Sian konsenton pri la Esperanta eldono afable donis ankaŭ Matica hrvatska el Petrinja. En la libro sur 72 paĝoj aperis 26 rakontoj, ĉefe kun la temo de Patrolanda milito. Ili estas grandparte biografiaj notoj de la aŭtorino kun nostalgiaj sentoj al la Tilia Urbo - Petrinja.



Dokumentan Esperanto-Centron en Đurđevac, dum la somero vizitis Mirek Grena (Ĉeĥio), Boris Arrate Veranes (Kubo), Marti Ruiz-Altaba (Svislando), Jana Kamenická (Slovakio), Maria Butan (Rumanio), Ho Song (Suda Koreujo), Nijole Petraityte (Litovio) kaj Vlado Jurković (Zagrebo). Ekde ĉi tiu jaro DEC estas notita en la Jarlibro de UEA ankaŭ sub "Loka grupo".

ESPERIGA STRATEGIO EN ALBANIO

Bardhyl Selimi

Sekretario de Albana Esperanto-Asocio

Kvankam la Esperanto-movado en Albanio datiĝas almenaŭ ekde la jaro 1907, kiam ĝin fondis la katolika pastro Lazar Shantoja, mortpafita de komunistoj en 1945, ĝi evoluis pli rapide nur post la jaro 1990.

Tiam oni permesis fondi la tiel nomatajn neregistarajn organizaĵojn, inter kiuj la Albana Esperanto-Ligo, agnoskita de la albana Ministerio de Kulturo majo 1991 estis inter la unuaj. Sekvis vigla agado por propagandi, instrui, eldoni, traduki kaj komunikiĝi kun eksterlando. Tiam aktivis pluraj samideanoj en kelkaj ĉefaj urboj. Post la jaro 1997 ni sukcesis aliĝi al la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (Pollando) kelkdekojn da studentoj el kiuj almenaŭ 30 bakalaŭriĝis kaj du magistriĝis. En ISTK Esperanto estis baza instrulingvo.

Bedaŭrinde, la albana Ministerio de Edukado ankoraŭ ne agnoskas iliajn diplomojn, subskribitajn de AIS-profesoroj, simple pro la fakto ke AIS estas jure registrita ĉe la juĝejo de San Marino anstataŭ ĉe la Ministerio de Edukado de tiu eta ŝtato.



Grupo de alilandaj esperantistoj kiu vizitis Albanion en 2012

Ekde tri jaroj ankaŭ albanoj povas libere moviĝi tra la Ŝengena zono. Tiu pozitiva atingo de albanoj, paradokse efikis negative en nia varbado por Esperanto, ĉar verŝajne antaŭe niaj junuloj uzis Esperanton por moviĝi libere eksterlanden. Sed ankaŭ la Ministerio de Edukado kaj la registara lingva politiko, favorantaj la anglan, malatentas pri la ceteraj fremdaj lingvoj kaj malfavoris ankaŭ la enkondukon de Esperanto en lernejojn kaj universitatojn. Estas menciinde ke la iama albana

registro de la sendependiĝinta Albanio, en la jaro 1922 subtenis la proponon por enkonduki Esperanton en bazajn lernejojn.

Al tio aldoniĝis ankaŭ la maljuniĝo de nia samideanaro kaj retiriĝo de parto el ili el la movado. Des pli ĉar la ŝtato postulis la registriĝon de la Ligo en la juĝejo, kio postulis sufiĉe multe da mono. En tiaj kondiĉoj estis tre bonvena la propono de s-ro Tomasz Chmielik el Ŝvidnik (Pollando), por traduki en Esperanton konatajn verkojn el la albana literaturo. Li mem estis tradukinta tra alilingvaj versioj kelkajn romanojn de eksterlande tre famiĝintaj albanaj aŭtoroj, kiel Ismail Kadare kaj Fatos Kongoli, kaj poeziaĵojn de aliaj aŭtoroj el Albanio kaj Kosovo.

Antaŭ du jaroj aperis la romano "Hunda haŭto" de Fatos Kongoli, kiu cetere estas membro de Akademio de Sciencoj de Albanio. La prezento de lia verko okazis aprile 2012 en la salono de la Akademio kun la ĉeesto de profesoroj, politikistoj, ĵurnalistoj kaj havis grandan reĥon enlande.



**Konsiderinda pliriĉigo
de albana beletra en Esperanto**



Tomasz Chmielik (maldekstre) kaj Bardhyl Selimi (dekstre) kun la albana verkisto Fatos Kongoli (meze) en Tirano

Grupo de polaj esperantistoj kiuj ĉeestis la eventon, estis intervjuita en la televido kaj preleginta antaŭ la studentoj de Tirana Universitato.

Antaŭ nelonge, aperis pliaj du verkoj, la novelaro "Sloganoj el ŝtonoj" de Ylljet Aliĉka kaj la poemaro "Lundo en sep tagoj" de Luljeta Lleshanaku.

Preskaŭ pretas alia romano de Fatos Kongoli, "La Perdinto" kaj poemaro de Eqrem Basha. Ĝis la jarfino aperos ankaŭ poemaro de Sali Bashota kaj eventuale la romano "La senfina funebra procesio" de Visar Zhiti, la

aktuala ministro de kulturo.

Kvar romanoj de Ismail Kadare atendas la subskribon de favora kontrakto kun la agentoj de la aŭtoro eksterlande ĉar ĉio efektiviĝas preskaŭ volontule kaj danke al la mono kolektita de amikoj. La aliaj aŭtoroj ne postulis monon de ni.

Akcentindas ke granda helpo estas donintaj per provlegado la s-roj István Ertl kaj Josip Pleadin, kaj ĉi-lastaj ankaŭ enpaĝigis senpage la menciitajn librojn.

La Eŭropa Komisiono ĉe UEA revigliĝis ĉar ankaŭ en

nia malnova kontinento ekzistas malfortaj movadoj, inter kiuj tiu en Albanio. Ĉi-kaze alvenis monhelpo de individuaj samideanoj por subteni la enlandajn aktivecojn de nia asocio, pro kio ni estas tre dankemaj.

Dume ni estis kompilitantaj la necesajn dokumentojn kaj frue en 2013 ni akiris la leĝan agnoskon de nia Asocio en la Tribunalato de Tirano. Verŝajne tiu fakto ebligis ankaŭ la formalan akcepton de nia Asocio kiel la 71-a membro de UEA la 26-an de julio 2013. Tiukaze vizitis nian landon s-ino Tatjana Loskutovo el Ivanovo (Rusio), kiu sukcese prelegis antaŭ kelkdeko da ĉeestintoj en la Nacia Biblioteko en Tirano, kie oni starigis standon kun pluraj ekzempleroj de Esperantaj libroj el la kolekto de tiu biblioteko. Interalie oni prezentis la originale verkitan en Esperanto kaj eldonitan en la jaro 1929 la historian verkon "Skenderbeg - heroo de Albanujo" de esperantisto Cuk Simoni, kelkajn lernolibrojn de la Internacia Lingvo por albanoj, tradukojn el Esperanto al la albana ktp.

Ni esperas ke ankaŭ per Esperantaj tradukoj de renomaj albanaj verkistoj ni allogos la enlandan opinion kaj konvinkos la edukajn instituciojn pri la neceso de enkonduko de Esperanto en niajn lernejojn.

ALEKSIJE HERIĆ (1928-2013)

La 29-an de junio 2013 en la Hejmo por maljunuloj en Vinkovci forpasis la multjara esperantisto **Aleksije Herić**. Li naskiĝis en Prnjavor (Bosnio kaj Hercegovino) la 17-an de marto 1928. Teknikan altlernejon li finis en Zagrebo en 1965, kaj laboris kiel inĝeniero en la Teknika lernejo en Borovo ĝis sia emeritiĝo en 1989. Esperantisto ekde 1959. Kunfondinto de Esperanto-societo "Fratoj Ribar" en

Borovo kaj ĝia multjara sekretario. Li aktivis en la redakta komitato de la revuo "Voĉo" eldonita de Esperanto-societo "Fratoj Ribar", gvidis kursojn kaj partoprenis en pluraj enlandaj kaj eksterlandaj kongresoj kaj aliaj aranĝoj. Naŭ jarojn dum la Patrolanda milito li estis ekzilita el Vukovar kaj vivis en Županja. La lastajn jarojn li pasigis en Hejmo por maljunuloj, kie li gvidis kursojn de Esperanto.





POLOJ JAM KVINFOJE EN LODZO



*Robert Kamiński, Magda
Tatara kaj Gizela Sklorz*

Andrzej Sochacki

Inter la 28-a kaj 30-a de junio 2013 okazis la 33-a Pola Esperanto-kongreso. Laŭ la decido de la novelektita Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio (PEA), la organizajn taskojn plenumis la esperantistoj el urbo Lodzo, en kiu la pola kongreso okazis jam kvinfoje.

De post la 32-a kongreso pasis jam du jaroj, kaj la ŝanĝoj en la Estraro de PEA, respektive la planoj de nova skipo, estis la ĉefaj kialoj por organizi la 33-an. La novaj estraranoj volis pridiskuti la nunan staton de la pola Esperanto-movado kaj akceptigi la novan statuton. Dum la lodza kongreso okazis landa kunveno de PEA-delegitoj. Post la okazinta publika diskuto pri la problemoj de pola Esperantujo, en kiu aktive partoprenis reprezentantoj de diversaj polaj Esperanto-organizoj, la delegitoj

pridiskutis la laste anoncitan korektojn en la nova statuto, inter kiuj la plej gravaj estas la ebligo de individua membreco en PEA kaj la nova sistemo de voĉdonado. Per tio nuligas la malmoderna sistemo de filiaj delegitoj.

La kongresa programo estis escepte riĉa. Oni povis elekti inter prelegoj, ekskursoj kaj ĉiutagaj artaj programoj. La tuta kongreso estis en la signo de la kongresa temo "Julian Tuwim - de Esperanto ĝis gloro". Julian Tuwim estas pola poeto kaj esperantisto naskiĝinta en Lodzo. La Pola Parlamento proklamis la jaron 2013 "La jaro de Julian Tuwim".

Julian Tuwim (1894-1953) komencis sian literaturan karieron kiel tradukanto de la pola poezio al Esperanto. Li tradukis verkojn de eminenta pola modernisma poeto Leopold Staff kaj publikigis ilin en "Pola Esperantisto", kun kiu li kunlaboris dum kvar jaroj (1911-1914), tradukante ankaŭ verkojn de aliaj polaj poetoj. Poste li verkis siajn proprajn poeziaĵojn en la pola

lingvo, dank' al kio li fariĝis vaste konata kaj lia verkaro analizata en lernejoj. Tuwim aŭtoris kelkajn famajn kanzonojn de la intermilita periodo, kaj skribis versaĵojn por infanoj. Kelkajn el ili en Esperanto prezentis dumkongrese lernantoj de la 199-a bazlernejo el Lodzo, portanta la nomon de Julian Tuwim.

Precipe interesa estis la prezento de "Lodzaj adresoj de Julian Tuwim" farita de Ryszard Bonisławski, senatano de la Pola Respubliko kaj eminenta lodza ĉiĉerono. Speciale por la Kongreso estis eldonita la poemo de Julian Tuwim "Balo en opero", Esperantigita de Lidia Lięża el Krakovo, redaktita kaj postparolita de Tomasz Chmielik (prezidanto de ILEI-Pollando), kaj ilustrita per grafikajoj de Marta Rak-Podgórska. La verkon eldonis la Pola Sekcio de ILEI. Tomasz Chmielik prezentis du prelegojn: pri Tuwim kaj pri Lodzermensch. D-rino Ilona Koutny gvidis seminarion pri edukado kaj invitis partopreni la instruistan trejnadon okazantan ekde septembro, surbaze de la Interlingvistikaj Studoj en la Poznana Universitato de Adam Mickiewicz. Interesan prelegon pri homa identeco prezentis Zlatko



Tiŝlar, la estrarano de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

Sur la kongresa scenejo kantis, ludis kaj dancis nur lodzaj artistoj – de infanoj el bazlernejo ĝis profesiaj artistoj el Alta Muzika Akademio.

Okazis ankaŭ profesie ĉiĉeronataj promenadoj tra la urbo laŭ la spuroj de la fama poeto Julian Tuwim.

En la programparto "nekonataj talentoj de polaj esperantistoj" kun granda plezuro ĉiuj rigardis pentraĵojn de la lodziano Marta Rak-Podgórska kaj aŭskultis ŝian majstran kantadon. Roman Dobrzyński prezentis siajn novajn filmojn. Ne mankis ankaŭ minuto de silento por memoro de la lasttempe forpasintaj esperantistoj. Ili daŭre vivas en niaj koroj kaj en nia memoro. Ni rememoris pri ili ankaŭ dum la preĝo. La animzorganto de polaj esperantistoj, la pastro Roman Gmyrek, celebris Esperantan diservon en la Dominikana Kapelo.

La ĉefa urba biblioteko en Lodzo organizis interesan ekspozicion pri la vivo kaj verko de Julian Tuwim kaj pri la historio de Esperanto-movado en la kongresa urbo.

Alla kongreso venis ankaŭ reprezentantoj de EDE-Pollando (Eŭropa Demokratio Esperanto), kiuj proponis kandidatiĝi Esperanton al la novkreita Pola Listo de Nemateria Nacia Heredaĵo. La ideo estas interesa sed bezonas profesian plenumadon de multaĝa dokumentaro. Multaj esperantistoj akceptas tiun proponon. Bedaŭrinde la du duhoraj diskutoj kun EDE-representantoj ne efikas per vivigo de interorganiza laborgrupo kiu povus plenumi tiun taskon. La cetero bonan kongresan etoson malordigis la provo de EDE okazigi diskuton pri la listo en la ĉefa

salono, ignorante la organizantojn de la kongreso kaj la pli frue akceptitan programon. Malgraŭ tio, la bona etoso regis dum la Lodza Kongreso. Bonega vetero kaj la bonkvalita tranoktejo en la Hotelo "Savoj" proksima al la kongresejo, kontentigis la partoprenantojn.

La 33-a Pola Esperanto-Kongreson en Lodzo estis grava evento. Ĉiujaraj naciaj kongresoj estas bezonataj por diskuti kaj interŝanĝi spertojn kaj informojn.

En la 33-a kongreson partoprenis ĉirkaŭ 120 personoj, inter kiuj kelkaj eksterlandaj esperantistoj.



PER BOATOJ SUR KUPA

Srećko Radulović

De la 31-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto, organizita de Esperanto-societo "Sisak" kiel ĉeforganizanto kaj de Esperanto-societoj "Viktor Mihovilić" el Karlovac, "Mondo paca" el Velika Gorica kaj Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj el Zagrebo kiel kunorganizantoj, okazis jam la kvina Boatado sur la rivero Kupa.

Partoprenis 18 personoj, kiuj en motorboatoj pasis tra 130 kilometrojn longa vojo inter Karlovac kaj Sisak. Krom la boatado mem, okazis diversaj programoj (sinbanado kaj sunumado, kultur-artaj programoj en vilaĝoj surborde de la rivero, kurso de Esperanto, kuirado de fiŝprikaŝo, kurso por boatstiristoj kaj kurso pri orientiĝo en la naturo).

La organizantoj jam anoncas la 6-an boatadon, kiu okazos inter la 31-a de julio kaj 5-a de aŭgusto 2014.

Pliajn informojn liveras:
boatado.kask@gmail.com



Zagreba Esperantisto

91

LASTA SALUTO AL IVO BOROVIČKI (1924-2013)

 Redakcia kompilo

La 23-an de julio 2013 en Pula forpasis **Ivo Borovečki**, unu el la plej rimarkindaj personecoj de la kroata Esperanto-movado en la pasinta duonjarcento. Lia nomo meritas orkoloran mencion en la historio de nia movado, kvankam li mem reduktis sian biografion al nur kelkdeko da linioj.

Ivo Borovečki estis Honora membro de Universala Esperanto-Asocio, honorita per tiu titolo en 1997, la jaro dum kiu okazis la unua kongreso de kroataj esperantistoj. Dum kelkaj lastaj jaroj li estis ofte malsana, sed li daŭre aktivis laŭ siaj povoj kaj kapabloj, almenaŭ en la traduka kaj artikolverka kampoj, interalie tre ofte kontaktante kaj kunlaborante kun nia redakcio. La malboniĝinta vidkapablo malebligis al li okupiĝi pri lia plej ŝatata afero - la legado. Kvankam grandparte izolita de la fizika kontaktado kun la movado, li uzis ĉiun eblecon por informiĝi pri novaĵoj, planoj kaj progreso de Esperanto. Evidente, Esperanto por li estis pli ol hobbio - ĝi estis lia tuta vivo!

Ivo naskiĝis la 25-an de februaro 1924 en Karlovac. Fininte klasikan gimnazion, li ekstudis medicinon en Zagrebo, doktoriĝis en 1952 kaj specialigis pri radiologio. Pri lia esperantistiĝo ni ekscias el la artikolo "Rememoroj de veterano" (aperinta en "Tempo" 3/2005, paĝo 4), en kiu li skribis, ke Esperanton li lernis senpere antaŭ la dua mondmilito (1940), sed aktivigis post la milito (kiun li pasigis en la partizana armeo de Tito), en la jaro 1945, kiam estis fondita Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo. Ĉe la fondkunveno de Esperanto-societo "Bude Borjan" kaj Kroata



Esperanto-Ligo, li konatiĝis ankaŭ kun Ivo Lapenna, kun kiu li amikis kaj plej intense kunlaboris dum multaj postaj jaroj. En la jaroj 1952-1956 li laboris en Radiologia Instituto de la Zagreba Medicina Fakultato, kaj en tiu periodo, krom kiel tre kapabla radiologo, li afirmiĝis ankaŭ kiel aktivega esperantisto. El tiu periodo datas liaj plej grandaj sukcesoj. En la jaroj 1951-1953 li estis samtempe kaj komitatano de

Universala Esperanto-Asocio, kaj prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Federacio. Sed eble neniu tasko forkonsumis tioman energion kiel la prezidanta rolo en la LKK de la 38-a UK, okazinta en 1953 en Zagrebo. Ĝi estis brile aranĝita, kaj Ivo Borovečki, kiel la plej gravan eventon de tiu tempo, menciadis sian oficialan viziton al la tiama jugoslavia prezidento Josip Broz Tito.



Ivo Borovečki kaj Ivo Lapenna en la UK en Oslo (1952)



Esperantistoj en la aŭdienco ĉe Josip Broz Tito en 1953 (Ivo Borovečki estas la kvara de maldekstre)

Eĉ post la UK, liaj movadaj taskoj abundis, kaj faris el li, apud Ivo Lapenna, la plej konatan jugoslavian esperantiston de tiu epoko. Ĉar Ivo Lapenna forlasis la landon, Borovečki kunredaktis la gazeton "La Suda Stelo" (1947-1950). Li redaktis la konatajn Esperanto-elsendojn de Radio Zagrebo (1953-1956), kaj en la jaroj 1955-1956 li estis lektoro de Esperanto en la Ekonomika Fakultato de la Zagreba Universitato.

Profesiaj taskoj gvidis lin al Etiopio, kie en Adis Abebo li laboris en la Ŝtata hospitalo por malriĉuloj en la jaroj 1956-1960. El tiu fazo de lia vivo gravas menciis, ke li fondis la unuan Esperanto-grupon en Etiopio en 1959, nur unu jaron post la Esperanto-kurso kiun li gvidis en Adis Abebo. Dum mallonga tempo li laboris en Alĝerio, kaj ekde 1961 li ekloĝis en Pula, laborinte tie ĝis sia pensiĝo en 1987.

Li estis membro kaj aktivulo de loka Esperanto-societo "La Adriatika Stelo", kiun li prezidis en la jaroj 1967-1968.

Politike li aktivis kiel deputito de Kroata Parlamento inter 1963 kaj 1965, kaj sian grandan ŝaton al astronomio li esprimis per membreco en la Astronomia societo "Istrio" en Pula, kies prezidanto li estis inter 1976 kaj 1981.

Ĉiam li okupiĝis pri tradukado (ĉefe de poezio) el la kroata al Esperanto. Liaj tre bonkvalitaj tradukoj aperadis en antologioj kaj revuoj, kaj ekde la apero de "Zagreba Esperantisto" ankaŭ en ĝi. Verŝajne lia plej lasta traduko estas ĝuste la poemo "Eĉ inter floroj la just' ne regas", kiun publikigis "Zagreba Esperantisto" en sia numero 21.

Kvankam per kresko de aĝo ankaŭ liaj aktivecoj en Esperantujo fariĝis malpli oftaj, li tamen partoprenis la unuan kongreson de kroataj esperantistoj



La redakcio de Esperanto-elsendoj de Radio Zagrebo (1956), kun Ivo Borovečki staranta meze



Ernfrid Malmgren (la unua de maldekstre) kun Ivo Borovečki (la tria de maldekstre) en la aŭdienco ĉe la zagreba urbestro Većeslav Holjevac (1953)

en 1997 kaj la Universalan Kongreson en Zagrebo en 2001.

Unu el liaj grandaj kontribuoj estis la lektorado de la vortaroj de Lucija Borčić eldonitaj en 2008 kaj 2009.

Kiel rekta atestanto de historiaj eventoj de nia movado, li donacis plurajn dokumentojn, fotojn kaj eldonaĵojn al Dokumenta Esperanto-Centro en Ĵurđevac por prizorgo. En DEC troviĝas lia dosiero D-0217, kiu enhavas iom el la bunto de lia krea laboro, parte nekonata.

De Ivo Borovečki adiaŭis ankaŭ la partoprenintoj de la ĉi-jara "Adriatika feriado" en Prvić Luka. En la koncerto de Neven Mrzlečki tie prezentita, estis kantita la kanto "Laro kaj mi", kiun Ivo tradukis en la jaro 2010 (vidu en "Tempo" 109).



Ivo Borovečki ĉe la inaŭguro de Zamenhofa strato en Zagrebo (1953)

JOSIP VRANČIĆ (1923-2013)

Kun granda malfruo ni eksciis, ke ankoraŭ la 26-an de marto 2013 forpasis en Hrvatski Leskovac la membro de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), universitata profesoro Josip Vrančić.

Profesoro Josip Vrančić naskiĝis la 2-an de marto 1923 en Koprivnica. Li diplomiĝis pri arthistorio en la Zagreba Universitato en 1951. En la komenco li prelegis pri arthistorio en Lernejo por aplikitaj artoj en Zagrebo (1952-1956) kaj samtempe estis aktiva komentisto de moderna kroata pentroarto en zagrebaj periodaĵoj kaj radio. Post sia translokiĝo al Dubrovnik li estis direktoro de la tiea Artgalerio en la jaroj 1956-1964. En la jaro 1965 li translokiĝis al Zadar por prelegi arthistorion ĉe la tiea Filozofia fakultato (1965-1993). Per tezo pri moderna kroata pentristo Milivoj Uzelac li doktoriĝis en la Zagreba Universitato en 1976, kaj la tezo estis libroforme eldonita en 1991. En la jaro 1993 li pensiĝis kiel universitata profesoro en Zadar, kaj la lastajn vivojarojn li pasigis ĉe sia filino en Hrvatski Leskovac. Krom

 Redakcia kompilo



Prof. dr. sci. Josip Vrančić

pri moderna plastika arto, li kiel specialisto okupiĝis pri kulturologio kaj urbanologio.

Profesoro Josip Vrančić estis esperantisto ekde 1951. Li esperantistiĝis en la kurso de Lucija Borčić, gvidita per la lernolibro de Dušan Maruzzi. Li okupis diversajn funkciojn en la komitato de la zagreba Esperanto-societo

"Bude Borjan". Prezidanto de Kroatia Esperanto-Ligo li estis en la jaroj 1955-1956. Ankaŭ dum sia restado en Zadar li estis prezidanto kaj komitatano de la tiea Esperanto-societo. Li gvidis plurajn kursojn kaj kunlaboris en Esperantaj gazetoj. Li prelegis en kelkaj Universalaj Kongresoj de Esperanto (Zagrebo, Varsovio kaj Budapeŝto), kaj estis membro kaj preleganto ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San Marino.

Kvankam dum siaj lastaj jaroj li ne estis movade aktiva, tamen li estis membro de UZE ekde la komenco. Li plurfoje finance subtenis nian organizaĵon kaj regule legis nian gazeton.

Omaĝkunveno por profesoro Vrančić okazis la 18-an de junio 2013 en la Universitato de Zadar. Dum la kunveno pri lia vivo parolis la rektoro de la Universitato prof. dr. sci. Ante Uglešić, la estro de Fako pri arthistorio de la Universitato Zadar prof. dr. sci. Pavao Pavuša Vežić kaj prof. dr. sci. Emil Hilje el la Fako pri arthistorio de la Universitato Zadar.

Generacioj de studentoj memoras lin kiel mirinde mildan personon.

Al la familianoj de profesoro Vrančić, la redakcio kaj UZE esprimas profundan kondolencon.

Sur la maldekstra foto staras veterana kvaropo fotita dum la Unua kongreso de kroataj esperantistoj en Zagrebo 1997. De maldekstre Josip Vrančić (forpasinta en 2013), Ivo Borovečki (forpasinta en 2013), Dalibor Brozović (forpasinta en 2009) kaj Ivo Puharić (vivanta en Makarska).

Fotoj el la arkivo de DEC.





FAJROBRIGADAJ EMBLEMOJ SERĈATAJ

Neesperantisto, kolektanto de fajrobrigadaj emblemoj (portataj sur uniformoj), kiu jam posedas pli ol mil emblemojn el diversaj landoj kaj preparas ekspozicion, turnis sin al esperantistoj, petante ilian helpon por internaciigi la kolekton. Bonvolu peti fajrobrigadojn en viaj urboj kaj landoj donaci sian emblemon por tiu unika kolekto, kaj sendi ĝin al s-ro Novica Štefanić, Trg Kralja Tomislava 19, HR-48363 Podravske Sesvete, Kroatio.

KIOM VALORAS LA ZAMENHOFAJ KULERETOJ?

Neesperantisto el Aŭstralio ofertas por vendo kuleretojn kun Zamenhofs portreto. Bonvolu vidi kiel la kuleretoj aspektas kaj sendi vian oferteton al nia redakcio: zagreba.esperantisto@gmail.com



Mi petas ke vi ne plu sendu al mi "Zagreban Esperantiston". La kaŭzo estas simpla: Mi ne plu volas legi pri la kverelo okazanta en Kroata Esperanto-Ligo.

F. I. (Zagrebo)

Kun intereso mi legis la unuan parton de la artikolo pri John Matasin, kiu aperis en la numero 2/2013. Kelkaj rimarketoj: La foto de Volo kaj Matasin (paĝo 50) estis farita dum geedziĝfesto, sed laŭ mia kompreno ne temis pri la geedziĝfesto de Volo. Mi ne scias kies festo estis. La unua edzino de Matasin certe ne mortis en 1887! Krome estas du aliaj tajperaroj. Mi antaŭĝojas legi la duan parton de la artikolo.

Nicole Else (Aŭstralio)

Mi ĵus ricevis vian gazeton n-ro 2013/2, en kiu aperas raporto pri la invito al ILEI konferenco en Zagrebo. Mi tre dankas.

Kun plezuron mi vidis fragmenton de "Padma" en tiu kajero.

Mireille Grosjean (Svislando)

Oni diris al nia ĵurnalisto pri Adriatika Feriado

Davor Grgat

Mi multe ŝatas la Adriatikan Feriadan kiu sukcesis kunligi turismon kaj esperantistan renkontiĝon. Laŭ mi, la Feriado estas tre sukcesa. Mi venas la unuan fojon al Kroatio. Memkompreneble, ĉio kion mi vidis, aŭ vizitis, estas treege bela kaj memorinda. La insula etoso estas mirinda. Ni multe promenadis, naĝis, babiladis. Dank' al la ŝipestro Vinko kaj nia organizanto Josip ni vizitis belegajn insulojn Kornati. Poste ni en Šibenik vizitis la belegan katedralon, kaj trarigardis la plej interesajn historiajn kaj kulturajn vidindaĵojn de tiu malnova urbo.

(Catherine Royaux, Belgio)

Mi venas el Svislando, el la urbo Ĝenevo. Mi jam dufoje vizitis Kroation, la unuan fojon kiam ĝi estis parto de eksa Jugoslavio. Tiam mi vizitis Dubrovnik kaj la urbon Split en la jaro 1978. Tiujare okazis la Universala Kongreso de Esperanto en Varna, Bulgario, kaj poste dum kelkaj tagoj mi restadis en Kroatio. En Adriatika Feriado mi rimarkis ke la lingva kaj organiza kvalito estas bonegaj, kaj mi tre ŝatis partopreni. Mi ne povus imagi pli bonan organizadon eĉ se tion farus profesiuloj. Tiom da diskutado kaj pripensado de la futuro kaj celo de la movado estis tre interesa, ĉar

la homoj kiuj partoprenas en la diskutado jam havas spertojn kaj ideojn.

(Marti Ruiz-Altaba, Svislando)

Mi venas el Slovakio. Ĉe ni oni diras, ke slovaka maro troviĝas en Kroatio. Ĉe la organizanto de Adriatika Feriado mi devas plendi ĉar li forgesis kunporti la Esperantan flagon. Ni havis bonegan ideon por reklami la aranĝon. Mi havas la impreson, ke tiu ĉi feriado estis bonega. La bela, pura kaj varma maro ebligis, ke ĉion malbonan ni forgesu, kaj pro tio mi estas feliĉa. Se konsideri, ke mi partoprenis la unuan Adriatikan feriadon kun esperantistoj el multaj eŭropaj landoj kaj ke ni senzorge povis interparoli en Esperanto, mia feliĉo estas des pli granda. Tiu ĉi evento por ni ĉiuj estas neforgesebla, pri tio mi ne dubas! La maron mi ĝenerale ne ŝatas, ĉar mi loĝas en la montaro, sed al Adriatika maro mi enamiĝis. Ĉien kien ni iris, via maro estas pura, bela kaj varma, kaj pro tio mi ŝatas la feriadon, kaj certe mi rekomendos ĝin al aliaj. Mi ĝojas ke Kroatio nun estas parto de Eŭropa Unio, ka mi gratulas al la kroatoj tiun atingadon.

(Jana Kamenická, Slovakio)

N I A U N U A **ADRIATIKA FERIADO**

Prvić Luka
2013

